


Lampo



super

floro



en


vazo



sur

tablo

kato



sub



esperanto

APRILLO 1960

53a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 653 (4)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Esperanto eksperimente en la oficiala instruplano,
Vibenshus Lernejo, Kopenhago (vidu la art. p. 62).

Enhavo

UNESKO honorigas la nomon de D-ro

Zamenhof	61
Instrui	61
Komenciĝis la granda lerneja kampanjo	62
Paŝoj faritaj en Nederlando	62
Vivanta Ligo de Nacioj	63
La Internacia Arta Teatro	67
La membronombro en 1959	67
Kiu estas kiu en la Esp. Movado	69
Interŝanĝo de bildkartoj	69
Bruselo antendas vin.	70
César Franck	71
La Zamenhof-Jaro en Bulgarujo	73
Grava enketo	74
Generalo Bastien	79

Rubrikoj :

C.E.D.	66
La Juna Vivo	68
Tra la Mondo	72
La Internaciaj Konkursoj 1960	73
Ŝaka Rubriko	74
Novaj Libroj	75
Nekrologo	76
45-a U.K.	77
Radio	78
Oficiala Informilo	79

Manuskripto por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

UNESKO honorigas la nomon de D-ro Zamenhof

La Deka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO akceptis rezolucion (5.15), per kiu ĝi invitis ĉiujn Ŝtatojn-Membrojn kaj la Naciajn UNESKO-Komisionojn fari al la Ĝenerala Direktoro proponojn pri "celebrado de datrevenoj de grandaj personecoj kaj eventoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, okazontaj en 1959-1960".

La unuaj proponoj rilatis al celebrado de A. P. Ĉeĥov, F. Chopin, Charles Darwin, Pierre Janet (franca psikologo), Henri Bergson (franca filozofo), Friedrich von Schiller, Alexander von Humboldt, Franz Josef Haydn kaj Ŝalom Aleiĥem (Dok. 54 EX/7 de la 10-a de aprilo 1959). Ĉiuj ĉi proponoj estis akceptitaj de la Plenuma Komitato dum ĝia Junia Sesio, 1959 (Dok. 54 EX/Decisions de la 22-a de junio 1959, p-to 4, 6).

Intertempe formiĝis kaj ekfunkciis la Internacia Organiza Komitato (IOK) kaj la Internacia Patrona Komitato (IPK) por celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. La ampleksa Baza Programo komencis realiĝi. La IOK kaj ĉiuj organoj de la Esperanto-Movado ekagis sisteme kaj laŭplane en la tuta mondo. La rezultoj de tiu impona kaj ĉiuflanka laboro estas pli-malpli konataj. Kompreneble, unu el la multnombraj aktivecoj estis direktita al UNESKO. Ne nur la Sekretariato de UNESKO, sed ankaŭ la Naciaj UNESKO-Komisionoj kaj la aliaj UNESKO instancoj estis atentigitaj pri la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Al ĉiuj estis liveritaj abundaj dokumentaj materialoj. Tute speciale, la membroj de la Plenuma Komitato ricevis la bazan dokumentaron pri la Zamenhof-Jaro kaj la plej gravajn studojn eldonitajn de CED.

Pliaj proponoj, faritaj al la Ĝenerala Direktoro, rilatis al 6 nomoj, inter kiuj la fama hispana pentristo Diego Velasquez, kiu mortis en 1660, kaj D-ro L. L. Zamenhof. La proponon pri Zamenhof faris Brazilo, Japanujo kaj Universala Esperanto-Asocio, kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun UNESKO (Dok. 55 EX/5 de oktobro 1959).

El la protokolo de la kunsido de la Plenuma Komitato, okazinta en Parizo la 25-a de novembro 1959, sekvas, ke la propono pri Zamenhof ricevis fortan apogon kaj estis unuanime akceptita. S-ro Kuypers (Belgujo) deklaris, ke laŭ la peto de la Nederlanda Nacia Komisiono de UNESKO "la Belga Nacia Komisiono decidis apogi la proponon koncerne la celebradon de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof". S-ro De Alba (Meksikio) aliĝis al la propono de s-ro Kuypers por la celebrado de Zamenhof "simbolo de la interhoma frateco". S-ro Wierblowski (Pollando) dankis al la delegitoj, kiuj proponis "la celebradon de la datreveno de D-ro Zamenhof". S-ro Moreira de Mello (Brazilo) esprimis sian ĝojon, ke la propono rilate al D-ro Zamenhof "estas aprobita de multnombraj membroj de la Plenuma Komitato". S-ro Soebroto (Indonezio) apogis la proponon pri Zamenhof kaj akcentis, ke UEA "rapide vastigas siajn aktivecojn kaj li opinias ke la verko de D-ro Zamenhof meritas celebradon". La proponon apogis ankaŭ s-ro Stempel (Venezuelo). (Ĉiuj citaĵoj laŭ Dok. 55 EX/SR. 5 de la 27-a de nov. 1959).

Efektivigante la decidon de la Plenuma Komitato la Ĝenerala Direktoro de UNESKO sendis al ĉiuj Registaroj kaj Naciaj UNESKO-Komisionoj cirkuleran leteron CL/1406 de la 15-a de februaro 1960 invitante ilin celebri en 1960 la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

La decido de UNESKO estas vera krono de la brila Zamenhof-Jaro. Ĝi estas la plej alta honorigo, kiun iam ricevis la nomo de D-ro Zamenhof. Ĝi estas samtempe plia rekono al la grandeco de lia verko.

I. L.

INSTRUI

Lerni Esperanton oni povas diversmaniere. Multaj akiris bonan, kelkfoje eĉ perfektan, lingvoscion el lernolibro, sen ies ajn helpo. La unuaj esperantistoj eĉ ne povis agi alimaniere, sed ankaŭ hodiaŭ la nombro de memlernantoj ne estas malgranda. Miloj da lernolibroj, vendataj ĉiujare al personoj, pri kiuj niaj organizaĵoj bedaŭrinde posedas nenian informon, pruvas tion. Esperanto certe estas la sola lingvo, kiu pro siaj simpla strukturo, facila prononco kaj fonetika ortografio ebligas tion. Sed nuntempe ekzistas ankaŭ kursoj korespondaj, per radio, en kelkaj gazetoj, en nombro da lernejoj. Ĉio ĉi estas bona, utila kaj nepre subteninda. Tamen, en la nuna stadio, la ĉefan rolon sur tiu ĉi kampo plue havas, aŭ devas havi, niaj lokaj grupoj.

Iam ne estis imagebla societo, kiu ne organizus — apud la aliaj agadoj, kompreneble — ĉiujare almenaŭ unu kurson por komencantoj kaj unu por progresintoj. Kelkaj — ekzemple la antaŭmilita Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb — havis daŭre plurajn kursojn. Bona reklamado — en AEK ĉ. 500 grandaj afiŝoj, 10.000 flugfolioj, anoncoj en gazetoj, kinejoj, per radio ktp. du fojojn jare — altiris grandan nombron da lernantoj. Relative altaj kotizoj kovris ĉiujn reklamkostojn kaj — respektigis la lingvon. Centoj fariĝis bonegaj esperantistoj kaj restis en la Movado.

Nuntempe tro multaj societoj — ne ĉiuj, feliĉe — tute malatentas la instruadon. Fermitaj en si mem, ili elviviĝas en sia "familia rondo" kaj kulpigas la tutan mondon, kun la escepto de si mem, pro la stagno. Kelkfoje oni ellaboras tutajn teoriojn por pravigi sian pasivecon. Eĉ okazis, ke societo en multmilionna urbo jam dum jaroj ne malfermis propran kurson kvazaŭe "por ne konkurenci" al alia vespera kurseto kun deko da lernantoj! Kia fido pri la eblecoj altiri al la Internacia Lingvo ne dekon, sed milojn da novaj gelernantoj el inter la milionoj!

Cetere, kial ne konkurenci aŭ, pli ĝuste, konkursi? Oni konkursu en ĉiuj sferoj de agado, inkluzive la instruadon de la lingvo, sed ne en malagado. Ju pli vigla la konkursado, des pli bonaj la rezultoj por la tuta afero de la Internacia Lingvo.

La kampanjo por enkonduko de Esperanto en la lernejojn certe vastigos la instruadon de la lingvo laŭ tiu vojo. Ĝi ne servu kiel preteksto por neglekti kiun ajn alian formon. Male, ĝuste tiu ĉi kampanjo instigu la bonajn societojn intensigi tiun flankon de sia laboro, kaj la aliajn nepre organizi novajn kursojn. Nur daŭre instruante la lingvon eblas konstante grandigadi la nombron de esperantistoj, fortikigadi la organizaĵojn, ampleksigadi la praktikajn aplikojn.

D-ro Ivo Lapenna

Komenciĝis la granda lerneja kampanjo

Unu el la plej gravaj kaj eble la plej decida kampanjo en la historio de la Internacia Lingvo jam komenciĝis. Plenumante la Decidon de la Komitato de la 15-a de decembro 1959, la ĝenerala sekretario de UEA jam skizis la planon de la nova agado. La 16-an de februaro 1960 foriris la unua cirkulera letero pri la afero kun ĉiuj plej necesaj informoj, sugestoj pri agado, senperaj taskoj. Tiun cirkuleron ricevis ĉiuj landaj asocioj, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj, porinforme, la komitatanoj de UEA, la fakaj kaj neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj.

En la unua parto la dokumento koncize informas pri la nuna stato de Esperanto en lernejoj. En ĝi estas ankaŭ mallonge analizitaj la eblecoj de agado laŭ diversaj vojoj, depende de la cirkonstancoj en unuopaj landoj kaj depende de la jam akiritaj pozicioj.

La dua parto entenas konkretajn sugestojn pri la organizo de la laboro. Ĉiu landa asocio, kiu deziras partopreni en la kampanjo, devos nomi aŭ komisionon aŭ nur specialan komisiiton, kiu okupiĝos plene pri la laboro sur tiu ĉi kampo. La koncerna persono aŭ la membroj de la komisiono nepre devos havi ne nur bonan volon por kunlabori, sed ankaŭ la necesajn kvalifikaĵojn. La tasko de la komisionoj aŭ komisiitoj estos popularigi la kampanjon inter la esperantistaro, plue favorigi la publikan opinion ekster la Esperanto-Movado, entrepreni la necesajn paŝojn ĉe la edukaj aŭtoritatoj. Ne estas eble prezenti ĉi tie ĉiujn detalojn — kaj tio ankaŭ ne estus oportuna en la nuna momento — sed oni povas diri, ke estas antaŭvidita nova ondo de artikoloj, informoj, radio-disaŭdigoj, diskutrondoj, seminarioj k.s. CED ankoraŭfoje prenis sur sin malfacilan, ampleksan kaj gravan taskon: havigi taŭgajn informojn,

kunmeti statistikojn, liveri studojn, artikolojn kaj aliajn materialojn.

La tria parto rilatas al la senperaj taskoj. La ĉefa en la nuna momento estas la komenca organiza laboro.

Jam alvenis la unuaj reagoj. Tri landaj asocioj jam decidis partopreni en la kampanjo kaj nomis siajn komisiitojn. Kiam oni legos tiujn ĉi liniojn, tute certe la nombro estos multe pli granda kaj la organiza laboro jam estos konsiderinde progresinta.

Kiel ĉiam antaŭ grandaj laboroj, venis ankaŭ kelkaj pesimismaj leteroj. Ili estas nur esprimo de manko de fido, aŭ malemo labori. Neniu granda celo povas esti atingita sen grandaj fortostreĉoj. Ĉio en strebadoj kiel la nia estis ĉiam realigata nur malfacile, per multe da laboro kaj oferoj. Kaj tion atingis ne la malkuraĝuloj, kiuj timis sian propran ombron, nek la fantaziuloj, kiuj kalkulis la ombrojn kiel realajn fortojn, sed firmaj, klarvidaj personoj, kiuj objektive taksis ĉiujn faktorojn kaj la efektive disponeblajn rimedojn. En la nuna kampanjo — same kiel en la antaŭaj, aŭ eble eĉ pli multe — estas bezonataj precize tiaj realismaj, sed pro tio ne malpli aŭdacaj, agantoj. Kaj tiajn, feliĉe, ni havas.

Ĉiuj kunlaborantaj organizaĵoj kaj unuopuloj estos daŭre informataj pri la progresado de la laboro en la centro kaj en diversaj landoj. La tuta Esperantistaro estos sciigata nur pri la plej gravaj atingoj.

Centoj da infanoj nun lernas la lingvon en lernejoj de diversaj landoj. Eble nur post kelkaj jaroj estos miloj aŭ eĉ dekmiloj da tiaj infanoj. Ĉiu helpu laŭ siaj eblecoj, por ke jam la nuna generacio de infanoj povu ĝui ĉiuflanke la avantaĝojn de unusola komuna lingvo por la internaciaj rilatoj, kiam tiu generacio fariĝos plenaĝa!

I. L.

PAŜOJ FARITAJ EN NEDERLANDO

La oficejo "Esperanto en la Instruado" en Nederlando direktis al la Ministro pri Instruado, Artoj kaj Sciencoj, la jenajn petojn: ke al la Esperanto-diplomo estu donita la valoro de elementa instru-kapableco, egala al la diplomo pri aliaj lingvoj; ke estu malfermita la ebleco de libervola instruado de Esperanto en la programo de la elementaj lernejoj: ke estu farataj eksperimentoj kun Esperanto kiel baza lingvo por la instruado de aliaj lingvoj en la mezlernejoj.

Ĉi tiuj petoj estis faritaj kun la aprobo de D-ro J. M. van Buytenen, inspektoro de la mezgrada instruado kaj ŝtata reprezentanto ĉe la Esperanto-

ekzamenoj, kaj de la inspektoroj de la elementa instruado, B. A. J. Stoepman kaj L. Kleiterp.

Pro la favoraj rezultoj de la eksperimentoj kun Esperanto en lernejoj en eksterlando, la Ĝenerala Inspektoro Ing. M. Goote kaj la ĉefinspektoro H. A. Dijksterhuis kun intereso atendas eksperimentojn ĉe la plivasta elementa instruado.

Dum aŭdienco ĉe la Ministro evidentiĝis ke lia moŝto ne estas kontraŭ kelkaj el la de la oficejo esprimitaj deziroj, kiujn pliklarigis D-ro G. P. Gunning, antaŭa rektoro de la amsterdama liceo, A. Ridderbos, ĉefestrarano de la Nederlanda Instruista Unuiĝo kaj D-dino C. M. Burger, antaŭa direktorino de knabina mezlernejo en Haarlem.



College Hall, la unua ĉefdomo de la Amerika Universitato de Beirut.

Mia matena promenado al la ĉiutaga laboro estas la plej mirinda de mia vivo. Proksime al mia loĝejo mi atingas la altan muron, kiu ĉirkaŭas la universitatan terenon. Mi pasas tra la pordego kaj jen, jam malproksime de la agitata urbo ekstere, mi trovas min en alia mondo. Mondo, kiu ne havas distingojn laŭ rasa deveno, laŭ religia kredo, laŭ nacia aparteno. Ĉi tie, tuj malantaŭ la enirejo, renkontiĝadas la studentoj de la Universitato. Diskutas nigraj gejunuloj de Sudano, Etiopio aŭ Somalilando kun pli helaj gekamaradoj de Libano, Irano aŭ Afganistano. Koloron de la hinda kultur-rondo donas pakistanaj junulinoj en longaj, brilaj sarioj, graciaj reprezentantoj de homa digneco elkreskinta el miljara tradicio — ili konsiliĝas pri studaferoj aŭ belliteraturo kun moderne vestitaj knabinoj de la okcidenta mondo, junulinoj el Eŭropo, Usono aŭ el la okcidentiĝanta Proksima Oriento. Atmosfero de internacieco, de renkontiĝemo, de spirita malfermeco. Kiel neeviteble devas kreski ĉi tie el la kontaktoj reciproka rekonado kaj respekto, intergenta kaj interreligia komprenemo kaj toleremo.

Mi preterpasas la babilantajn grupojn. Mi trovas mian vojon tra la bunta subtropika ĝardeno, kiun formas la universitata tereno sur deklivoj alte super la Mediteraneo — miaj okuloj serĉas la maron, kiu etendiĝas ĝis la malproksima horizonto

Vivanta Ligo de Nacioj

La Amerika Universitato de Beirut

de Profesoro, D-ro Paul Neergaard,
American University of Beirut, Libano.

kun koloro pli pura, pli malhele blua ol povis konvinki min la fama prikantado.

Kion plu postuli de la vivo, pasante gajajn, grupojn, foje salutante miajn karajn studentojn el foraj landoj, ĉiuj homoj egalaj, havantaj la samajn eblojn. Kaj kaptante en tiu ĉi mateno per ĉiuj miaj sensoj la buntecon kaj la bonodoron de la salmkoloraj ĉinaj hibiskorojoj, de la palbluaj plumbagofloroj kaj de la varmflavaj koroloj de la okzalaj, kiuj densiĝas kiel fekunda printempa grundo inter pinoj kaj figarboj, platanoj kaj cedroj kaj eŭkaliptoj. Homoj kaj naturo, junularo kaj sciavido. Vartejo de kulturo en la plej bela senco de la vorto.

La statistiko dokumentas la internaciecon de la universitata vivo. Ĉi-jare estas enregistritaj 2661 studentoj el 41 landoj kaj 20 diversaj religioj. Al tio aldoniĝas la studentoj de la apartenantaj Internacia Kolegio kaj Amerika Komunuma Lernejo, per kiuj la tuta studkomunumo atingas 4248 studentojn el 50 landoj kaj 20 religioj. El la universitataj studentoj 1412 estas kristanoj, 1246 nekristanoj, 3 sen religia prefero. La plimulto de la studentoj venas el Libano, Jordano, Irano, Unuiĝinta Araba Respubliko, Palestino (rifuĝintoj), Pakistano, Etiopio, Usono, Indonezio, Sudano, Grekujo, Irako, Afganistano.

Ankaŭ la profesoraro estas tre internacia kaj kredeble reprezentas ĉ. 20 landojn. La Amerika Universitato de Beirut sendube estas la plej inter-

nacia universitato en la mondo. Ĝia situo en Libano, la renkontejo inter Oriento kaj Okcidento, kaj ĉe la Mediteraneo, kie ankaŭ renkontiĝas Eŭropo kun Afriko, favoras alfluon de studentoj el landaj de tre diferenca kulturo kaj teknika disvolviĝo kaj same favoras influon de okcidenta kaj orienta kulturoj kaj estiĝon de reciproka rekonado de valoroj.

La historia fono de la evoluo de tiu unika demokratia institucio estas rimarkinda. La Universitato fondiĝis en 1866 (kun 16 studentoj) laŭ iniciato de usonaj protestantaj misiistoj kaj nomiĝis dum la unuaj jardekoj Siria Protestanta Kolegio. Fakultato de Medicino malfermiĝis 1867, de Farmacio 1871, de Komerco 1900, de Inĝenierarto 1951, de Flegado 1952, de Agrikulturo 1952, kaj de Publika Sano 1954. La religia deveno de la Universitato respeguliĝas en vigla religia vivo, ekz. regulaj ĉiusemajnaj diservoj en la universitata kunvenejo. Sed estas atentinda la deklarita principo de plena libereco rilate al religia, socia kaj politika kredo.

Tiu liberala kaj demokrata sinteno de la Universitato estas bele esprimita en klasika eldiraĵo de D-ro Daniel Bliss, la fondinto kaj unua rektoro de la Universitato (de 1866 ĝis 1902). Ĉe la inaŭguro en 1872 de unu el la ĉefdomoj de la Universitato rektoro Bliss diris :


"Tiu ĉi Kolegio estas por ĉiuj kondiĉoj kaj klasoj de viroj, sen konsidero pri koloro, nacieco, raso

aŭ religio. Viro blanka, nigra aŭ flava; kristano, judo, mahometano aŭ pagano, povas enregistriĝi kaj ĝui la avantaĝojn de tiu ĉi institucio dum tri, kvar aŭ ok jaroj, kaj eliri, kredante je Dio, je multaj dioj aŭ je neniuj Dio. Sed estos neeble por kiu ajn resti ĉe ni longe ne sciigante, kio estas en nia kredo vero, kaj kial ni havas tiun kredon !"

La Amerika Universitato de Beirut estas la plej granda kaj sendube la gvidanta universitato en la Meza Oriento. Ĝi estas la plej granda usona universitato ekster Usono. La landoj de la Meza Oriento ĝis Hindujo kaj la landoj de la vekiĝantaj nacioj de Afriko bezonas edukadon de junuloj, kiuj povas transpreni gvidajn postenojn en la politika, teknika kaj kultura vivo de tiuj junaj nacioj. En Etiopio, ekzemple, hodiaŭ ekzistas en postenoj nur nemultaj dekoj da personoj, kiuj trapasis mezlernejan edukadon — ne parolante pri universitata ! La nombro de etiopiaj studentoj en la Amerika Universitato de Beirut hodiaŭ estas pli ol 100 ! Multaj diplomitoj el la Amerika Universitato de Beirut transprenis gvidajn postenojn en la publika vivo de la arabaj landoj. Precipe ĉe la sendependiĝo de Libano 1947 multaj profesoroj kaj diplomitoj estis vokataj al gravaj postenoj de la nova ŝtato, ekz. Charles Malik kiu fariĝis libana ministro en Vaŝingtono, poste dum periodo prezidanto de la Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. Kaj en la konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj en San Francisko tridek diplomitoj kaj antaŭaj studentoj de la Universitato partoprenis. Je unu okazo diplomitoj de tiu ĉi Universitato funkciis kiel gvidantoj de kvin delegacioj de la Unuiĝintaj Nacioj.

La Universitato kontribuis esence al la scienca esplorado de la literaturo, kulturo kaj antikva civilizacio de la Meza Oriento. Famaj sciencistoj de arabaj studoj estas N. A. Faris, I. Jabur kaj C. K. Zurayk. Internacie konata estas Edward Kennedy pro esploroj pri araba matematiko kaj astronomio. Tre altnivela estas la kemia departemento de la Universitato, precipe en la kampo de biokemio, en kiu distingiĝis i.a. Stanley Kerr. En la medicina fakultato reputacion ĝuas i.a. la neŭrofiziologiaj esploroj de William M. Shanklin, en la inĝeniera fako elstariĝas la esploroj pri betono de Rubinsky kaj rekonata esploristino en la kampo de nukleofiziko estas Salwa Najjar, kiu krom profesoro ĉe la Universitato estas konstanta kunlaboranto de la libana registaro pri nukleofizikaj problemoj.

La fakultato, al kiu mi apartenas, tiu de agrikulturaj sciencoj, estas nova, sed tre vigla, jam publikiginta depost sia fondiĝo en 1952 tridekon da sciencaj traktaĵoj. Ĝia stabo sin dediĉas, konforme al principa decido kaj aranĝo, duone al instruado, duone al scienca esplorado. Apartenas al la Universitato bonege ekipita eksperimenta farmo, lokita en la valo inter la du montoĉenoj de Libano, nomataj Libano kaj Antilibano. Mi mem



La Universitata Biblioteko.



La Fakultato de Agrikulturaj Sciencoj

laŭinvite transprenis du katedrojn, tiun de plantpatologio kaj tiun de semteknologio, ambaŭ departementojn kun bone ekipitaj laboratorioj por esplorado kaj por instruado. Mi havas entute ĉ. 65 studantojn. Kiel parton de mia scienca laboro mi havis la belan travivaĵon aŭtomobile ekskursi al foraj, izolitaj lokoj en la libanaj montoj por kolekti semspecimenojn, precipe de tritiko kaj de hordeo kun la celo pristudi la kvaliton de la semo fakte uzata de la kamparanoj. La specimenojn mi kune kun miaj kunlaborantoj studos en la universitata farmo dum la venontaj monatoj — ĝermis la plantoj de tiuj semoj, kiujn produktis dum jardekoj la lokaj kamparanoj, verŝajne dum generacioj, eble dum jarcentoj! Adaptiĝis la lokaj grenvarioj al la kondiĉoj de la krudaj montaj regionoj, valoraj, heredaj karakteroj disvolviĝis en tiu-ĉi malnova nun stagniĝinta materialo, ecoj utiligendaj por selektado, krucado kaj bredado por krei novajn, pli altkvalitajn variojn por la estonteco, alportontajn pli da pano al la kreskanta loĝantaro. Karakteriza ekzemplo de la teknikaj problemoj en tiu-ĉi por la sciencisto tiel virga parto de la mondo.

Dum mia restado ĉi tie miaj internaciaj kontaktoj, kiel prezidanto de internacia sempatologia komitato, rezultis en invito por internacia sempatologia konferenco ĉe la Universitato en februaro de tiu ĉi jaro. La konferenco vekis grandan atenton. Antaŭis ĝin serio da komparaj sempatologiaj eksperimentoj, kiujn partoprenis 23 laboratorioj en 20 landoj. Reprezentantoj de 10 landoj partoprenis la konferencon, kiun malfermis la libana ministro de agrikulturo kaj la rektoro de la Universitato. Interesos certe la legantojn, ke la reprezentanto de unu el la landoj, Orienta Germanujo, estis konata mikologo kaj plantpatologo, Profesoro D-ro G. Sörgel, pro kio estis kelkfoje krom la angla lingvo uzata ankaŭ Esperanto same kiel okaze la franca, dum la konferenco, lingva solvo, kiun akceptis kiel naturan ĉiuj partoprenintoj en kelkaj

okazoj de lingva embaraso. Mi aldonas, ke profesoro Sörgel dum sia vizito bonvolis fari unuhoran prelegon en Esperanto pri sia vojaĝo en Ĉinujo, al ĉ. 15-membra grupo da studentoj, al kiu mi instruas Esperanton. Kvankam ricevintaj tiam nur 3 (tri) lecionojn de la lingvo ili bone komprenis kaj vigle amuziĝis pro la sprita rakontado.

La Amerika Universitato de Beirut estu atentata de ni laŭmerite kiel grava kontribuanto en la konstruado de estonta mondo de komprenemo kaj harmonia kunlaboremo trans ĉiuj limoj de rasoj, religioj kaj nacioj. Ĝi apartenas al la familio, en kiu membras UNESKO, FAO, Esperanto kaj ĉiuj aliaj pozitivaj aktivecoj, kiuj konstruas, ne per bonintenca teoria cerbumado kaj teoriado, sed per praktika agado.



La sportejo de la Universitato. Malantaŭe la Universitato havas privatan banejon ĉe la Mediteraneo

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanta teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO.

Mendu ĉe UEA !

Prezo : 4 int. resp. aŭ egalvaloro por la tuta serio.

BIBLIOGRAFIO DE LA INTERNACIA LINGVO POR 1958-1959

S-ro William Auld, la kunlaboranto de CED por bibliografiaj demandoj, ellaboris la Kvinan Aldonon de la Bibliografio de la Internacia Lingvo. Tiu ĉi aldono rilatas al la periodo 1958-1959. Idente al la antaŭaj, la aldono estas dividita en 25 fakoj. Entute estas eldonitaj 161 libroj kaj aliaj publikaĵoj. Inter la aliaj, aperis 2 aŭtobiografiaj verkoj, 2 biografioj, 4 dramoj, 12 romanoj kaj novellibroj, 4 verkoj pri geografio kaj vojaĝoj, 4 gvidlibroj, 5 verkoj de poezio, 2 pri lingvistiko, 15 en la branĉo sociaj kaj naturaj sciencoj. La nombro de publikigitaj lernolibroj estas 15, kaj tiu de vortaroj estas 8. Entute, en la periodo inter 1945 kaj 1959 aperis 1.233 verkoj.

Kompleta listo de ĉiuj eldonitaj verkoj aperos en unu el la sekvantaj dokumentoj de CED.

S-ro Auld nun revizias la tutan bibliografion por 1945-1959, ĉar necesis fari kelkajn kompletigojn. Kiam tiu laboro estos finita, CED multobligos la verkon kaj sendos ĝin al pluraj siaj kunlaborantoj kaj aliaj fakuloj por pliaj kompletigoj. Intertempe estos reviziita la Bibliografio de Internacia Lingvo de P. E. Stojan, kiun eldonis UEA en 1929. Samtempe estos pretigita la bibliografio por la periodo 1929-1945. Verŝajne tiu tuta laboro estos finita en tiu ĉi jaro, tiel ke fine de 1960 CED povos presigi monumentan kompletan verkon "Bibliografio de la Internacia Lingvo".

GRAVAJ DOKUMENTOJ DE CED

Okaze de la Zamenhof-Jaro multaj kunlaborantoj de CED verkis studojn kaj artikolojn, kiuj aperis aŭ en "Esperanto" aŭ estis senditaj al la landaj asocioj kaj kunlaborantoj en diversaj landoj por publikigo en la naciaj lingvoj. Fakte, laŭ la informoj ricevita, tiu materialo multege helpis por la diskonigo de la personeco de D-ro L. L. Zamenhof kaj de lia verko.

Kelkaj el tiuj studoj aperis kiel eldonaĵoj de CED en la regulaj serioj. Ili estis aŭ presitaj aŭ multobligitaj kun presita kovrilo. Ĉiuj havis la signon RDC/6 :

(1) RDC/6 CENTJARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE D-RO ZAMENHOF enhavis la nomojn de la Internacia Patrona Komitato, la Deklaracion, la Bazan Programon, la nomojn de la membroj de IOK kaj la artikolon de Prof. D-ro

E. Privat sub la titolo "D-ro L. L. Zamenhof"; publikigita en la lingvoj franca kaj angla (la sama aperis en 11 pliaj naciaj lingvoj, eldonita de diversaj landaj organizaĵoj).

(2) RDC/6-1 ZAMENHOF LAZARO LUDOVIKO, studo de Prof. G. Waringhien; eldonita en la franca kaj angla lingvoj.

(3) RDC/6-2 LA GRANDECO DE D-RO L. L. ZAMENHOF enhavis la studon de Prof. D-ro I. Lapenna, tiun de Marjorie Boulton, M. A. B. Litt. sub la titolo "L. L. Zamenhof — Pionira Poeto" kaj la studon de John Francis "Integro kaj Latentoj en la Verko de Zamenhof", aperis en la angla lingvo.

(4) RDC/6-3 LA INTERNACIA LINGVO KIEL BELARTA TRADUKILO, studo de William Auld, M.A., aperis en la angla.

La menciitaj dokumentoj estis eldonitaj en konsiderinde pli granda nombro da ekzempleroj ol la kutimaj dokumentoj de CED. Ili estis senditaj al ĉiuj partoj de la mondo. Diversaj sciencaj kaj kulturaj institucioj, bibliotekoj, UNESKO-instancoj, presagentejoj, gravaj revuoj ricevis ilin. Multaj bibliotekoj petis de CED unuopajn ekzemplerojn. Nun la tuta eldono de tiuj publikaĵoj estas elĉerpita. Konsiderante la fakton, ke UNESKO ĵus decidis celebri la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en 1960, CED nun planas la duan eldonon, kiu, se la plano realiĝos, aperos en formo de libro, kun ĉiuj menciitaj studoj.

GRAVA BIBLIOGRAFIA LABORO EN JUGOSLAVIO

Jugoslavia Esperanto-Federacio transdonis al sia Komisiono por Kultura Kunlaborado kun aliaj popoloj (KKK) la taskon prepari Jugoslavian Antologion en Esperanto. En la kadro de tiu laboro, kiun prizorgas kiel ĉefredaktoro la verkisto Živan Milisavac, Marinko Gjivoje kolektis abundajn informojn pri Jugoslavia literaturo jam tradukita en Esperanto. En la jaro 1954 JEF eldonis la modelan "Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio", kies aŭtoro estis la kunlaboranto de CED Marinko Gjivoje. Tiu bibliografio enhavis 229 erojn, sed ĝi rilatis nur al verkoj aperintaj libroforme. La nuna bibliografia materialo entenas ankaŭ beletrajn tradukojn, kiuj aperis en Esperantaj revuoj kaj gazetoj. La kunlaboranto de CED esploris tiucele jarkolektojn de 26 enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-revuoj kaj gazetoj. En Jugoslavio, laŭ la kolektitaj informoj, aperis libroforme 38 pure literaturaj verkoj, el kiuj 7 estas tradukita poezio, 13 tradukita prozo, 6 originala poezio kaj 12 originala prozo. La restintaj 762 bibliografiaj eroj enhavas 285 tradukitajn poemojn, 243 tradukitajn prozaĵojn, 177 originalajn poemojn kaj 57 originalajn prozaĵojn.

Apud la jam ekzistantaj similaj bibliografioj dana kaj japana, tiu ĉi bibliografio prezentas gravan

riĉigon sur tiu ĉi kampo. Espereble, en la proksima estonteco ankaŭ aliaj landoj sekvos tiujn ekzemplojn.

La bibliografiaj materialoj, kolektitaj de Marinko Gjivoje estas nun utiligataj ankaŭ por la grava verko "Leksikono de Jugoslavia Literaturo", kiun preparas ŝtata eldonejo en tiu lando. La verko enhavos la nomojn de ĉiuj jugoslaviaj verkistoj kun iliaj biografioj kaj indikoj pri la verkoj. Ĉe ĉiu verkisto estos mencio pri liaj verkoj tradukitaj en kiu ajn alia lingvo, inkluzive, kompreneble, la Internacian Lingvon. Plia imitinda ekzemplo.

FOTOSERVO PRI ZAMENHOF

CED iniciatis novan laboron: kolektadon de fotoj el la vivo de Zamenhof kaj de ĉio en ligo kun la familio Zamenhof. Tiun laboron komencis proprainiciate s-ro Henk Thien el Amsterdam kaj sukcesis jam havigi belan kolekton. El tiu kolekto aperis kelkaj fotoj en la decembra numero de "Esperanto" kaj multaj aliaj estos publikigitaj en la Memorlibro. Nun s-ro Thien akceptis la proponon fariĝi konstanta kunlaboranto de CED sur tiu kampo kaj gvidanto de la servo. Ĉiuj, kiuj posedas fotojn el la vivo de Zamenhof, aŭ kiuj deziras havigi kopiojn el la kolekto, bonvolu sin turni rekte al s-ro Henk Thien, Uiterwaardenstraat 12, II, Amsterdam, Nederlando.

DONACO LAURIE

Verŝajne multaj rimarkis la anoncon sur la kovrilpaĝo de la januara numero de "Esperanto", per kiu Gesinjoroj T. kaj F. Laurie el Bournemouth (Britujo), dezirante helpi al CED, decidis

"vendi brokante Esperantajn librojn" kaj "donaci la tutan sumon ricevotan al la kaso de CED". Gesinjoroj Laurie, kiuj jam plurfoje sendis donacojn al CED, nun denove trovis la vojon por plia tre bela donaco. CED ĵus ricevis la sumon de 25 anglaj pundoj, kiun ili ricevis por la venditaj libroj. Ili petis, ke CED danku al ĉiuj aĉetintoj, kion ĝi volonte faras, sed la ĉefa danko iras al la ĉiam agemaj Gesinjoroj Laurie pro ilia iniciato, el kiu rezultis financa helpo por la plua laboro de CED.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p.
Pastro Adolf Burghardt, Germanujo	14-	0	
N.N. en A. Nederlando	9-	5	
S-ro Karl Vosteen, Germanujo	4-	3	
S-ro Benmar, Usono	1-15-	7	
S-ro Spaander, Nederlando	14-	2	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	3	
S-ro G. F. Makkink, Nederlando	2-	7-2	
S-ino M. Bentke, Germanujo	8-	4	
S-ino R. Seddon, Britujo	2-	0-0	
Gesinjoroj Laurie, Britujo	25-	0-0	
Gesinjoroj K. Sly, Britujo	5-	0-0	
S-ro R. Slot, Nederlando	18-	10	
S-ro J. Kosutek, Aŭstralio	14-	9	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
E. H. O., Danlando	1-	4	
D-ro N. Tursi, Italujo	18-	11	
S-ro L. Minnaja, Italujo	18-	11	
Stato je la 5-a de marto 1960	43-	6-3	

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

LA INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro Srdjan Flego, fondinto kaj gvidanto de la Internacia Arta Teatro, sciigas al ni ke s-ro Nikolaj Rytjkov, eminenta moskva aktoro, sukcesis interesigi la plej gravan sovetan fakan teatran revuon "Teatr" (Teatro) pri la graveco de Esperanto. La redakcio pretas publikigi en aprila numero lian artikolon pri internacia teatro, en kiu li dediĉas grandan parton ankaŭ al la Internacia Arta Teatro, pionira teatro sur la kampo de internacia teatro kiu celas kaj klopodas enkonduki la uzon de Esperanto en profesiajn teatrajn mediojn. La redakcio intencas publikigi kune kelkajn fotojn el la "Friponaĵoj de Skapeno", kiujn la Internacia Arta Teatro prezentis dum la lasta Universala Kongreso en Varsovio. Ne necesas emfazi pri la graveco de tiu publikigo, gravega ne nur propagande en la nuna momento, sed eĉ pli grava konstrue por la estonto, kiam la Internacia Arta Teatro alpaŝos novajn vojojn por akceli la starigon de memstara, vere profesia internacia teatro esperanta.


Tial ni petas ĉiujn fotoamatorojn, kiuj eventuale fotis la prezentadon de "Friponaĵoj de Skapeno", ke ili bonvolu afable sendi la fotojn aŭ negativojn al la jena adreso: *Flego Srdjan, 67, bd. Pasteur, Paris XV.*

LA MEMBRONOMBRO 1959

Post kiam la vic-prezidanto en Londono verkis sian ĉefartikolon por la marta numero de "ESPERANTO", en la Centra Oficejo en Rotterdam alvenis ankoraŭ pliaj kotizoj 1959, kiuj lastmomente eniris la jaran statistikon. Tial la atenta leganto trovis diferencon inter la ciferoj sur paĝo 41 kaj sur paĝo 57. Oni ne miru pri tio. Eĉ post presigo de paĝo 57 alvenis ankoraŭ kotizoj 1959: 11 AM, 2 MJ, 5 MA, 2 MS, 1 J-MA, entute 21! Sekve, laŭ nuna kalkulo la jaro 1959 finiĝis per 32590 membroj, el kiuj 7444 individuaj. Tre povas esti, ke en novembro oni legos en la Dua Parto de la Jarlibro ankoraŭ pli altan ciferon ĉar — oni kredu aŭ ne — ankoraŭ meze en la nova jaro kelkfoje iuj membroj rimarkas, ke ili ne pagis por la antaŭa . . . !

Dir. C.O.

**LA KOTIZON PAGU FRUE KAJ EN KIEL
EBLE PLEJ ALTA KATEGORIO !**



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

Kiel resti sur akiritaj pozicioj

Seminario sur la lago Bohinj en Jugoslavio de la 15 ĝis la 25 de Julio.

Antaŭ 2-3 jaroj komenciĝis en kelkaj eŭropaj landoj intensa kaj organizita kampanjo por enkonduki Esperanton en la lernejojn. Inter la landoj, kiuj tiurilate atingis plej bonajn sukcesojn, certe staras ankaŭ Jugoslavio. En la jaro 1957 Jugoslavia Esperanto-Federacio organizis Someran Pedagogian Semajnon kiu donis bazon kaj direkton al la tuta lerneja agado. Dum la pasintaj tri jaroj la instruado sukcese kaj laŭplane progresis. Sed ĝi alportis kun si novan problemon. Montriĝis ke nura instruado ne plu sufiĉas. Tuj kiam la lernantoj akiras certan lingvoscion, oni devas montri al ili ĝian praktikan utilon. Ne nur al ili. Tion oni devas montri al aliaj instruistoj kaj profesoroj, al la lernejoj kaj klerigaj aŭtoritatoj. Spontanea korespondado de la lernantoj ne sufiĉas. Estas necese trovi pli konvenajn formojn por interesigi la lernantojn, por ligi ilin internaciskale, por plilarĝigi ilian horizonton, por helpi al pli objektiva kaj senpera instruado de historio, geografio, literaturo, arto, eĉ fremdaj lingvoj. Kaj tie unu sola instruisto estas senhelpa. Li bezonas apogon de tiuj, kiuj estas laŭ siaj aĝo kaj intereso plej proksimaj al la lernantoj — do, de la junularo.

Niaj junularaj esperantistaj organizaĵoj ĝis nun ne renkontis, almenaŭ ne en tia grado, similan problemon kaj ne estas ankoraŭ pretaj por transpreni tian taskon. Ni ĝis nun ligis nin nur al la societoj kaj laboris nur kun tiuj, kiuj venis al ni. Nun nin atendas nekompareble pli vasta kampo kiun ni devas surpaŝi preparitaj kaj konsciaj pri la grandeco kaj graveco de la problemo, se ni volas resti sur akiritaj pozicioj. Ni devas ankaŭ konscii, ke la nunaj organizaj formoj ne estos

ĉiam konvenaj kaj ke ni devos adapti kaj la organizon kaj la laboron al la novaj cirkonstancoj.

Konsiderante tian situacion Jugoslavia Esperanto-Federacio decidis ĉi-jare denove organizi similan seminario. Ĝia ĉefa temo estos: Praktika aplikado de Esperanto en la lernejo post akirita lingvoscio, kiun oni pri-traktos laŭ la punktoj: a) ĝenerala rolo de Esperanto en la lernejo kaj b) resumo de problemoj ligitaj al ĝi. Ĉefe oni dediĉos atenton al la du plej gravaj faktoroj kiuj unuavice devas helpi en la solvado de la problemo: pedagogoj organizitaj en ILEI kaj la junularo kun sia TEJO. Invititaj estos instruistoj kaj junularaj gvidantoj el pluraj landoj. La seminario okazos de la 15-a ĝis la 25-a de Julio 1960 sub aŭspicio de UEA kaj de la Nacia UNESKO-komisiono por Jugoslavio. Komforta junulara domo (por pliaĝuloj) kaj tendoj por gejunuloj en arbaro apud la montara lago Bohinj staros je dispono al la partoprenantoj.

Krom la menciitaj temoj la programo antaŭvidas ekspozicion de lernejoj helpiloj kaj literaturo, amuzajn vesperojn, kulturajn aranĝojn, filmojn, lumbildojn, tendarajn fajrojn, ekskursojn al la ĉirkaŭaĵo, banadon, remadon ktp.


Restadkosto por kompleta prizorgo estas 1 dolaro aŭ 600 din. tage por ĉiu persono. Por aliĝo kaj aliaj informoj oni turnu sin al JEF, Ljubljana, poŝtfako 275.

La aranĝo estos tre interesa kaj utila precipe por ni, gejunuloj. Antaŭvidita kvindeko da instruistoj kaj kvindeko da gejunuloj, kiuj alportos sian sperton kaj prezentos sian laboron per kulturaj aranĝoj, distraĵoj kaj sportaj ludoj ktp. certe faros unikan entuziasman agordon en internacia esperantista atmosfero. Ivo Osibov

Laborplano de la Junularo en Hungarujo

La Junulara Fakto de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro publikigis laborplanon por la jaro 1960. En la branĉoj: informado, instruado, organizado kaj internaciaj kontaktoj la plano antaŭvidas varian kaj aktivan agadon. Junularaj fakrondoj kunlaboros en la efektivigado de la programo de la tutlanda movado. Dum regionaj esperantistaj renkontoj oni

preparos apartajn aranĝojn por la junularo. La fakrondoj organizos kursojn kaj mem zorgos por kapabligi novajn instruistojn. Al landaj aranĝoj estos invititaj gvidantoj de eksterlandaj junularaj esperantistaj organizaĵoj. Pri siaj laboroj kaj sukcesoj la Junulara Fakto de HEK regule informados la landajn junularajn gazetojn.



ROTTERDAM ATENDAS VIN!

Rotterdam estas malnova urbo, ĝi havas la honorindan aĝon de preskaŭ 700 jaroj, tamen ĝi estas unu el la plej modernaj urboj en Eŭropo. Ĝi estas unu el la malmultaj urboj pri kiuj oni povas diri ke ili estas belaj kaj praktikaj, modernaj kaj harmoniaj. Malfermante siajn pordojn al artistoj kiuj venis el ĉiu angulo de la terglobo, Rotterdam donis al ili la okazon krei universalan idiomon por la urboj de la 21-a jarcento. Daŭre arkitektoj el la tuta mondo vizitas Rotterdam por ricevi tie inspiron. Sed ne nur por fakuloj tiu ĉi urbo estas interesa. Ĉiuj ricevas grandiozan impreson, ĉar Rotterdam estas absolute vidinda, speciale por junaj homoj, ĉar tiu urbo estas celita por la nova generacio.

Kaj al la nova generacio apartenas la membroj de T.E.J.O., kiujn Rotterdam estas atendantaj.

De la 23-a ĝis la 30-a de julio okazos en Rotterdam la 16-a Junulara Kongreso de TEJO. En la februara numero de "Esperanto" jam aperis la unua komuniko pri ĝi kun la provizora programo. Nun la definitiva programo estas preskaŭ preta, kaj ĉiu aliĝinto ricevos ĝin post kelkaj semajnoj. Oficiala akcepto de la urbestro de Rotterdam; vizito al konstruata digo, kiu fariĝos plia gloro de la nederlandaj inĝenieroj; vizito al la ekspozicio "Floriade", festo de floroj kaj koloroj; kaj ankoraŭ multaj aliaj aranĝoj atendas vin. Ne forgesu, ke la disponeblaj lokoj estas limigitaj kaj ke pli ol 50% el ili estas jam menditaj. Petu aliĝilon kaj ĉiujn informojn al: 16-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

Se vi jam partoprenis aliajn junularajn kongresojn, certe vi venos al Rotterdam. Se vi neniam pasigis unu semajnon en internacia junulara rondo, venu al Rotterdam, kie ĝuigan tempon vi havos.

Rotterdam atendas vin! Aliĝu tuj por Rotterdam!

Kiu estas kiu en la Esperanto-Movado?

La unua informo pri la elvolviĝo de la laboro por tiu ĉi verko aperis en la jarkolekto 1959, paĝ. 134, de tiu ĉi revuo; kaj alvokoj, laŭ la peto de nia cirkulero de 1958, aperis en aro da esperantistaj periodaĵoj. La eĥo, kiun vekis tiuj artikoloj, estas kontentiga, ĉar sin anoncis multaj por gratuli la iniciaton de la eldonisto kaj proponi sian kunlaboron.

Dume montriĝis, ke la aperdaton ni devas porti pli malfruen. La manuskripto povos esti preta ne pli frue ol antaŭ la fino de la nuna jaro.

Inter la kunlaborantoj por difinitaj landoj aŭ teritorioj, kiuj sin anoncis post la redakto de nia antaŭa artikolo, estas:

Jugoslavio: S-ro Marinko Gjivoje, Gornji trg 31/II, LJUBLJANA;

Germanujo: S-ro Walter Ranft, Freiligrathstrasse 4, RADEBEUL, DDR - GDR (subtenata de kompetentaj esperantistoj en la Germana Federacia Respubliko);

Argentino: S-ro Prof. E. Balech, Casilla de Correo 64, NECOCHEA;

Italujo: S-ro Giovanni Saggiori, Corso Vitt. Emanuele 6, PADOVA;

Hungarujo: S-ro V. Tóth, Veronika-utca 4, Fsz. BUDAPEST II.

Ni jam povas esprimi nian tutkoran dankon al la S-roj Mabeoone en Amsterdam; D-ro Couteaux, Paris; Donald E. Parrish, Los Angeles, Cal.; Juozas Petrulis, Vilnius, Litovujo, kaj al Bulgara Esperanto-Asocio, kiuj modele prilaboris la kandidato-proponojn de siaj respektivaj landoj.

En la citita unua informo pri K.e.K. ni invitis, ke oni sendu al ni informojn pri ĉiaspecaj eminentuloj — lingvistoj, politikistoj, scienculoj k.a. —, kiuj sin esprimis

favore aŭ malfavore pri internacia lingvo ĝenerale aŭ aparte pri Esperanto. Jam alvenis indikoj por tiu ĉi parto, kiuj, eĉ se nekompletaj, tamen servas kiel bazo. La skemo estas: kutimaj indikoj personaj (naskiĝo, loko, morto, socia pozicio); citaĵo kaj fonto de la respektivaj esprimoj pri la problemoj. Se temas pri presita teksto, citi la fonton kaj doni la opinion en la koncerna nacia lingvo (se latinalfabeta) kun traduko. Bulgara Esperanto-Asocio liveris por tiu ĉi parto modelan materialon pri bulgaraj eminentuloj.

La tria parto, speco de *Memoriga Tabulo*, citos la viktimojn de la pasinta epoko, kun nomo, antaŭnomo, deveno kaj, eventuale, jaro kaj loko de pereco.

Personoj, ekster la ĉefkunlaborantoj, kiuj sendos al la redaktoro utiligeblajn informojn, ricevos specialan dank-esprimon en formo de bildo de D-ro Zamenhof, sur enkadrigbla kartono.

Dum la lasta januaro la redaktoro de K.e.K. vizitis la eldoniston J. Régulo, en La Laguna, por revui kaj pri-diskuti la plenumitan laboron kaj interkonsenti pri multaj detaloj. Konstatinte, ke la titolo *Kiu estas kiu*, laŭvorta traduko de la angla *Who's who*, ne estas tute kontentiga, ili ŝanĝis ĝin provizore je *Kiu estas Kio en la Esperanto-Movado?* Sed ili danke akceptos sugestojn pri tiu ĉi punkto kaj sekve invitas sendi al la redaktejo proponojn de alternativoj.

La evoluo de la afero donis al ĝi kolektivan karakteron, pro la kunlaboro de aro da bonvoluloj, kiuj estas interesitaj, same kiel multegaj aktivuloj, scii:

KIU ESTAS KIO EN LA ESPERANTO-MOVADO?
Tenerife, la 5-an de januaro 1960.

Hans Jakob, Redaktoro
J. Régulo Pérez, Eldonisto

INTERŜANĜO DE BILDPOŝTKARTOJ

Inter la aktivecoj de Esperanto-klubo la letervespero certe okupas sufiĉe gravan lokon. Tamen nuntempe okazas ofte, ke envenas post anoncpeto tiucela tiel multe da respondoj de korespondemuloj, ke oni ne povas trovi sufiĉe da respondontoj. Tiel la rezulto estas pli negativa ol pozitiva, ĉar multe da Esperantistoj ne ricevas respondon, aŭ nur tre skize kaj tiamaniere spertas gravan seniluziigon.

Pro tio la estraro de nia Esperanto-klubo, la sekcio Arnhem de la landa nederlanda unuiĝo L.E.E.N., decidis en 1959 organizi ion alian sur la tereno de korespondado kaj petis en anonco en "Esperanto" alsendon de bildkartoj por geografia instruado. Reciproke ĝi promesis respondi per bildkarto de Nederlando. Ni intencis doni la ricevitajn kartojn al diversaj lernejoj, kie oni povos uzi ilin ĉe la instruado pri fremdaj landoj.

Tiu ĉi metodo havas laŭ ni diversajn avantaĝojn: Oni ne promesis ion, kion oni ne povas plenumi.

La sekretario povas tuj post ricevo respondi per bildkarto, tiel ke la sendinto ne bezonas longe atendi respondon.

Grava avantaĝo estas ke ni povas montri ankaŭ al ne-esperantistoj la praktikan valoron de nia laboro. La ricevitaj kartoj restos daŭre uzataj.

Kompreneble tia sistemo postulas iom da mono de la kluba kaso. En Arnhem ni havis la avantaĝon ke ni mem jam eldonis serion da bildkartoj kun klariga Esperanto-teksto. Tiel la kartoj nur kostis la aĉetprezon. Ni opinias ke bildpoŝtkartoj estas esence internacie uzataj objektoj, kaj estas fakte nekompreneble ke ankoraŭ nur tre malmulte da Esperanto-kluboj uzas kartojn kun Esperanto-teksto. Kiel eble plej multe da kluboj devas pristudi la eblecon mem eldoni bildpoŝtkartojn. Krome, kiam oni vendas tiajn dulingvajn kartojn al ne-esperantistoj, oni povas enspezi monon por la kluba kaso kaj oni faras samtempe propagandon.

La rezulto de nia anonco estis sufiĉe kontentiga. Ni ricevis el entute 18 landoj 37 sendaĵojn, el kiuj 5 leteroj aŭ kovertoj kun entute 51 bildkartoj, 7 turismaj broŝuroj kaj unu sekcia bulteno. I.a. el Ravenna — Italujo ni ricevis tre belajn turismajn broŝurojn. Bildkartojn ni ricevis i.a. el Germanujo, Hindujo, Hungarujo, Islando, Italujo, Polujo, Usono kaj Venezuelo.

Mi esperas ke aliaj esperantistoj povos iom profiti de ĉi tiuj sciigoj pri nia eksperimento. La kartoj estis tre bonvenaj ĉe la lernejoj.

H. Groendijk, Arnhem - Nederlando


Antaŭvojaĝo al la Kongresa Lando, Bruselo atendas vin!




*Ludu, ludu, arĝentaj bukcenoj!
Anoncu la alvenon de la kongresanoj en Bruselo!*



Bruselaj bulvaroj vastaj kiel ĝia senlima libereco!




Mia ĉefpreĝejo havas kvadratajn ŝultrojn, diras Bruselo.



La mondfama Granda Placo de Bruselo!



La atmosfero de Bruselo estas viva ĝojo, bonhumoro kaj amikeco....




Vi povas ekskursi al dolĉa Skeldo ĉe la mondhaveno Antverpeno....



....aŭ al Ostendo, reĝino de la plaĝoj....



...ĉe la ĉarma Bruĝo kun la venecia aspekto....



La fierfa naturo de la Ardenoj en la regiono de la Kvin Valoj!

**BILDOJ : C.I.B. kaj C.G.T.
FOTOJ : LIBOTTE, DE SUTTER,
HAINE, PONCIN, DE HAYER**



Mondfamaj belgoj

Grandaj artistoj verfakte apartenas al la tutmondo. Ili ne estu glorataj nur en nacia kadro. Sed ĉu ilia arto ne estas la sumo de ĉiaj influoj subkonsciaj, sangdevenaj kaj precipe junaĝaj?

Cezaro-Aŭgusto Franck, la serafa patro, kiel liaj lernantoj lin nomis, kaj unu el la plej gravaj instrumentaj komponistoj de la pasinta jarcento, naskiĝis en la ĉefurbo de Valonujo, Lieĝo. Li naskiĝis en simpla, modesta medio de valonaj burĝoj ĝermadevenaj. Prapatro lia el la 15-a jarcento, forlasis Aŭstrujon por ekloĝi en la duklando Limburgo, kaj lia patro mem edziĝis al knabino el Aachen. Ne mirige ke Cezaro Franck havis en si la kvalitojn de graveco, pacienco kaj mistikemo, krom la gaja optimismo de la sendependa, vivema kaj ironia Lieĝano kaj la vivĝojan piecon de la Sud-limborgano.

Li fakte nur estis apenaŭ dekkvinjara, kiam li foriris el la naskiĝurbo por sekvi en la pariza konservatorio kursojn de piano, fugo kaj orgeno, sed post nur unu jaro li tie jam premiĝis, kio sufiĉe pruvas ke, forlasinte la lieĝan muziklernejon, lia muzikintelekta disvolviĝo ampleksis ja iom pli ol elementajn nociojn pri muziko kaj pianoludo. En 1841 li denove vivis du jarojn en la naskiĝurbo kaj komponis unuan verkon, dediĉitan al la belga reĝo Leopoldo I, sed ne trovis tie la deziritajn favorajn cirkonstancojn por sia laboro.

La interrilatoj kun lia familio — la profiteza patro volis trudi al li karieron de virtuoza-komponisto laŭ la tiama gusto — malboniĝis kaj estis rompita, kiam li en 1848 edziĝis al filino de franca aktorino.

Por gajni sian vivopanon en Parizo li estis doninta lecionojn kaj tiam fariĝis orgenisto ĉe Nia Sinjorino de Loreto kaj dek jarojn poste ĉe preĝejo Sta Klotildo, kiu posedis orgenon de la fama Cavaillé-Coll. Lia lerninto d'Indy prilumis la signifon de tiu bonega muzikilo por Franck:

".....Estis en la duonombro de tiu galerio, ke pasis la plej bona parto de lia vivo; tie li dum tridek jaroj, ĉiun dimanĉon, ĉiun festotagon kaj lasttempe ĉiun vendredan matenon ekbruligis la fajron de sia genio per admirindaj improvizaĵoj; tie sendube li antaŭvidis kaj kreis superbelaĵojn melodiojn kaj formiĝis la muzika plano de "La Beatoj" (1869-79)".

Dum lia longedaŭra aktiveco pludisvolviĝis la stilo de Franck per religia subtilo, ĉiam pli belega sentkompreno de la religiaj misteroj. Brilis kiel delikata revteksaĵo lia meditema ludo senlaca. Tiel senlaca, ke la paroĥestro devis instalii sonorileton en la jubeo ...por averti la orgeniston, ke li ĉesu pro ekokazonta nova diservo. Tiuj improvizaĵoj tuŝis Liszt mem, kiu komparis lin kun J. S. Bach kaj konigis lin en Germanujo. Nur la morto povis malkunigi la majstron — kiu en 1872 estis nomita profesoro pri orgenludo ĉe la pariza konservatorio — de la karamata instrumento.

Sed fakte nur liaj lernantoj aprezis lin laŭvalore. La indiferento por la artisto, la komponisto almenaŭ, tiel simplanima, tuŝis la malsaĝon. La unua aŭdigo de "La

César Franck

La serafa komponisto

Beatoj" ne estis sukcesa sed la dua ... tri jarojn post lia morto tiom triumfa, ke lia nomo subite famiĝis en la tuta mondo. Ankaŭ koncerto kun "Simfoniaj Variacioj" (1885) en la programo, iĝis fiasko pro manko de intereso. La unua prezento de "Simfonio" (1889) nur donis ĉagrenon al li, ĉar ĝi okazis kontraŭ la volo de la konservatoria orkestro. Kritikisto raportis, post aŭskultado de "Ruth", pri eksterordinare naŭva simpleco de Franck kaj ... dudek-kvin jarojn poste pri la sama verko, ke ĝi estis "revelacio"! Sian unuan dumvivan sukceson li nur ĝuis per "Arĉinstrumenta Kvarteto" (1889), duonjaron antaŭ la morto, kiun kaŭzis en 1890 banala veturilakcidento.

Antaŭ la baziliko Sta Klotildo en Parizo staras la monumento de la majstro kaj, okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo, Lieĝo sammaniere honoris lian memoron en ĉeesto de la muzikama Reĝino Elizabeto de Belgujo.

Cezaro Franck, malgraŭ sia pieco, ne estas liturgia komponisto. Lia sentema spirito orientis lin same al klasika kiel al moderna arto, kiu proklamas lian kristanan fervoron sed en kiu triumfas la pura muziko.

Oni rimarkigis, ke la braveco de liaj harmonioj, lia adorego al la Temo, lia Wagnere plenigita orkestro kaj la fortika, ampleksa konstruo de liaj komponaĵoj instrumentaj lin altgrade distingas de tio, kio karakterizas la francan muzikarton, inkluzive tiun de Berlioz. Se li estas laŭdata kiel ĉefo de la moderna franca muziko, estas precipe pro lia emancipa agado rilate la muzikan skolistikon. De lia admiranta biografo Vincent d'Indy ĝis la plej junaj, ĉiuj plu konstruis sur lia verko. Tial li estis la elirpunkto de la moderna franca muziko.

Krom tio Cezaro Franck, la spertanto de l'paradiza beateco, estis trankvila, korspontana viro, kiu vivis nur por sia familio, lernantoj kaj senmorta arto. La gloro de tiu, kiun oni nomis "la Fra Angelico de la muziko" despli brilas, ĉar li mem estis morale bela kiel senmakula artaĵo.

Tyneverum

REDEMPTION

EDOUARD BLAU.

CÉSAR FRANCK.

INTRODUCTION.

Poco lento. $\text{♩} = 65$. PRIMA.

PIANO. *ppp*

très soutenu et chanté.

très soutenu mais extrêmement doux.

Tra la Mondo

Aŭstrujo

Laŭ dekreto de la landlerneja estraro por Supra-Aŭstrujo estas permesite ek de la 1-a de decembro 1959 gvidi Esperanto-kursojn sur libera bazo en la lernejoj komunumaj en Linz. La gvidadon transprenis sur sin la lerneja konsilisto Josef MRAZ. La intereso por la Internacia Lingvo estas granda, kaj la junularo jam fervore korespondas kun eksterlandanoj. La sukceson kaŭzis unuavice S-ro Kortega Konsilisto, Dipl. Ing. Georg Drimmel, Landlerneja Inspektoro por Supra-Aŭstrujo kaj la komunum-lerneja referanto Bol Wilhelm Lemoch.

Brazilo

La luksa scienca revuo "Revista Brasileira de Geografia" (Brazila revuo de Geografio) jam dum 20 jaroj eldonadas resumojn de siaj artikoloj en Esperanto. La revuo estas eldonata de la Nacia Konsilantaro de Geografio, organo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

★

La 29-an de majo 1957 fondiĝis en São Paulo "Komuna Lernejo de Esperanto". Instruiĝas tie 240 geler-nantoj. "K.L.E." eldonas la revuon "La Lampiro", kiu raportas detale pri la laboro en la lernejo. Petu ekzem-pleron de "La Lampiro" ĉe redaktoro Darcy Gaja, Caixa Postal 5888, S. Paulo, Brazilo.



La urbestro de São Paulo, D-ro Adhemar de Barros, transdonas la diplomon kaj manpremas la plej dili-gentan lernantinon, Zulejda Laran-geira.

Britujo

Esperanto-instruisto, I. R. Jump, Anglujo, antaŭ kvar jaroj organizis grandan ekspozicion de infandeseĝna-ĵoj, kaj li nun deziras aranĝi alian ekspozicion de lernejaj gazetoj, revuoj, bultenoj k.t.p. Pro tio li bezonas ek-zemplerojn de lernejaj eldonaĵoj el multaj landoj, nacilingvajn aŭ esper-antajn.

Ĉiuj, kiuj sendas revuon aŭ gazeton, ricevos ekzempleron de la lerneja revuo: "The Templar". La adreso: Temple School, Rochester, Anglujo.

Danlando

La 33-a Kongreso de SAT okazos en Arhus en la tagoj de la 23-a ĝis la 29-a de julio ĉijare. Informoj estas haveblaj ĉe: La prezidanto de OKK, S-ro Magnus Jacobsen, Rydersvej 9, Dan-lando, kaj ĉe la kasisto, S-ro Holger Hansen, Organiza Kongresa Komitato 1960, Åbyhøj, Danlando.

★

"Kie abundo estas malofta kaj manko pli malofta — DANIO". Sub tiu titolo la ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Danlando ĵus eldonis 32-paĝan libreton pri Danlando. Riĉe ilustrita la broŝuro rakontas pri la lando kaj pri la dana popolo, kaj ĝi tiel estas bonega enkondukilo en danajn aferojn, speciale redaktita por eksterlandanoj. Ĉar estas la unua fojo, ke la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj eldonas oficialan publikacion en la Internacia Lingvo, estas dezirinde, ke la Esperanto-publiko montras sian intereson pri ĝi. La belega libreto estas senpage havebla, kaj havebla nur ĉe la diplomaciaj reprezentantoj ekster-landaj, t.e. ĉe la ambasadejoj de la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj; tial oni sin turnu al la plej proksima dana ambasadejo por ĝin akiri.

Estonio

En Tallinn la teatra trupo de Esperanto-Sekcio la 30-an de januaro, sub gvidado de Hilda Täht, prezentis teatraĵon: "La Majstro venas", kies aŭtoro estas Felix Zamenhof, la frato de la aŭtoro de Esperanto. Samloke medicina mezlernejo sukcesis havi Esperanto-kurson gvidatan de S-ino Alma Lekko.

Francujo

En la salonego de la muzeo "Pams" (Scienca Instituto, Universitato de Montpellier) S-ro R. Llech-Walter faris prelegon, kies titolo estis: "Tra la lando de Chopin kaj Zamenhof, prelego pri Pollando". D-ro Bassouls, estro de la loka Scienca Asocio, prezidis. Multaj ĉeestis la interesan ves-peron.

Sovetunio

La tuta kulturita mondo celebras nunjare la centjaran datrevenon de la naskiĝo de Ĉeĥov, la granda rusa verkisto. Kelkaj verkoj de la aŭtoro de "Onklo Vanja" kaj "La surtuto" estas tradukitaj ankaŭ en Esperanton. Lia monologo pri "La malutilo de la Tabako" estis surscenigita en la Ope-rejo de Marseille en la Internacia Lingvo en 1957.

★

En pluraj urboj kaj urbetoj de Sovetunio funkcias Esperanto-kursoj, -rondetoj kaj aperadas informoj kaj artikoloj pri la Internacia Lingvo. Je iniciato de la rusa sciencisto Prof.

Nikolaj Baranskij, aŭtoro de multaj verkoj kaj lernolibroj pri ekomomia geografio, la revuo "Voprosi geo-grafii" (Problemoj de geografio) krom ruslingva teksto publikigas la enhavon de ĉiu kajero ankaŭ en Esperanto-resumo. En "Dom učitelja" (Domo por geinstruistoj) en Moskvo estas organi-zita Esperanto-sekcio, kiu havas la taskon aranĝadi perleterajn kaj per-sonajn kontaktojn kun pedagogoj el ĉiuj landoj.

Hungarujo

En Budapeŝto verkis Julio Baghy kaj komponisto M. Sarošy triaktan esper-antlingvan opereton.

Hispanujo

La XXVIII-a Internacia kaj Oficiala Specimena Foiro de Barcelona, unu el la plej gravaj tiaj foiroj, ĵus eldonis sian oficialan afiŝon en Esperanto, en formato 100 × 70 cm. kaj 30 × 20 cm. en 6 koloroj.

Komercistoj kaj aliaj interesitoj petu ĝin (kun indiko en kiuj komercaj aŭ industriaj firmaoj ili pendigos ĝin) ĉe: XXVIII Feria Oficiala Internaciona de Muestras Negociado de Publicidad, Paseo de Maria Christina, Barcelona 4, Hispanujo.

Jugoslavio

Dank' al fervora klopodo de kelkaj esperantistoj el Beograd la Esperanto-movado en Jugoslavio sukcesis akiri tre gravan publikan sukceson: ekde ĉijara horarsezono (1960/1961) oni povos en la oficiala horarlibro de Jugoslavaj Fervojoj legi diversajn klarigojn ankaŭ en Esperanto krom la ĝisnunajn serbo-kroatan kaj francan tekstojn.

Imitante la ekzemplon de aliaj landoj jam pasintjare estis en Zagreb stari-gita Esperanta informtabulo ĉe la ĉefa stacidomo. Ĉijare starigis tian tabulon ankaŭ Fervojista Esperanto-Societo Ljubljana antaŭ la informejo de la ĉefa stacidomo en Ljubljana.

Nederlando

La Amsterdama Kunlabor-Komitato Esperantista eldonis Nederlandan Es-peranto-adresaron por la turismo. Ĝi estas kompilita de D-ro J. Tensen.

Pere de tiu listo oni povas trairi Nederlandon uzante tre ofte Esperan-ton. Ĝi enhavas loĝejojn, restoraciojn, muzeojn k.t.p. La adresaro estas havebla ĉe: La turistoficejo "V.V.V.", Rokin 5, Amsterdamo-C.

Norvegujo

La eldonejo de Dreyer, Oslo, laŭ propono de Norvega Esperantista Ligo, decidis eldoni la libron de Edmond Privat — "Vivo de Zamenhof" en norvega lingvo — en Riksmå (t.e. ko-rekta ŝtata lingvo). Kondiĉo por la eldono estis, ke oni antaŭe havas 600 antaŭmendojn. Tiun nombron oni atin-gis.

La Zamenhof-Jaro en Bulgarujo

La festado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof estis bone aranĝita de CK de Bulgara Esperantista Asocio. Ni elektis Zamenhofan Komitaton, kiu per cirkuleroj, leteroj kaj persona interveno instigis kaj helpis la aranĝon de diversaj iniciativoj. Jen konciza raporto pri la farita laboro.

Bulgara Poŝta Administracio eldonis specialan poŝtmarkon en 100,000 pecoj. Bulgara Esperantista Asocio presigis grandformatan portreton de Zamenhof en 5,000 ekzempleroj. La portreton pentris la bulgara esperantisto Stefan Dečev. Bulgara Esperanta Asocio eldonis specialan Zamenhof-gazeton en 11,000 ekzempleroj.

En ĉiuj ĉefurbaj kaj departementaj ĵurnaloj, gazetoj kaj en iuj revuoj aperis artikoloj. Entute la dokumenta servo ricevis 52 artikolojn kaj 39 informojn aperintajn. Parto de la artikoloj enhavas la portreton de Zamenhof. La efiko de la artikoloj en la bulgara gazetaro estas granda, ĉar niaj ĵurnaloj kaj gazetoj havas nur kvar paĝojn kaj la legantoj ne havante amplekspaĝan presaĵon legas preskaŭ la tutan enhavon. Preskaŭ la duono de la artikoloj aperis en la ĉefurbaj ĵurnaloj, el kiuj kelkaj estas aperigataj en 500.000 ekzempleroj.

Entute okazis 63 kunvenoj kun 8,625 ĉeestantoj. La kunvenoj ĝenerale estis bone organizitaj kaj vizititaj. La kunvenojn oni propagandis per afiŝoj, invitiloj, informoj en la gazetaro aŭ disaŭdigoj per la lokaj radiocentroj. Ĉiam la festparoladojn ĉeestis 120-140, sed ankaŭ estis kunvenoj vizititaj de 1,000 personoj — en urbeto Sevlievo. En Sofia CK de Bulgara Esperantista Asocio organizis la kunvenon kune kun la jenaj organizaĵoj: La Urba komitato por defendo de la paco, la Urba komitato de la patrolanda fronto, Klubo de la kulturagantoj kaj Pola kultura centro. La festparoladon faris N. Aleksiev — sekretario de la Bulgaraj sindikatoj. La kunvenon partoprenis pli ol 600 personoj. En la sama urbo okazis ankoraŭ 3 aliaj Zamenhof-kunvenoj.

Alia menciinda fakto estas, ke en deko da bulgaraj vilaĝoj estis organizitaj solenaj kunvenoj kun sufiĉe granda sukceso.

Oni organizis 96 radio-disaŭdigojn pri Zamenhof, Esperanto kaj ties movado per urbaj, vilaĝaj aŭ uzinaj radio-centroj. Ilin aŭskultis multe da personoj. 35 vitrinoj

kaj 19 montrokestoj enhavis interesan materialon kaj kontribuis por propagando de Esperanto. En 3 urboj estis organizitaj ekspozicioj, kiujn partoprenis ĉirkaŭ 2840 vizitantoj.

En Bulgarujo pluraj stratoj, placoj kaj aliaj objektoj ricevis nomon Esperanto aŭ Zamenhof.

Strato Esperanto

U. Kazanlâk — je la 15.XII.1959

U. Kubrat — je la 6.X.1959

U. Sevlievo — je la 17.XII.1959

U. Jambol — en 1959

U. Sofia — antaŭ dek jaroj

Placo Esperanto

Urbo Asenovgrad — en 1956

Aleo Esperanto

U. Kazanlâk — je la 6.IV.1959

Dolĉaĵejo Esperanto

U. Kazanlâk — je la 6.IV.1959

Aŭtobusa haltjeo Esperanto

U. Kazanlâk — je la 20.V.1959

U. Varna — VI.1957

Placo Zamenhof

U. Kubrat — je la 10.III.1959

Strato Zamenhof

U. Sofio — je la 21.XI.1959

U. Varna — je la VI.1957

Hospitalo Zamenhof

Vilaĝo Rozino — 31.V.1959

Insulo Esperanto

En Danubo apud urbeto Orjahovo

En la lando estas stratoj kaj placoj nomitaj en la jam pasintaj jaroj — Esperanto aŭ Zamenhof. Pri ili ni siatepe informis. Verŝajne ankoraŭ 5—6 stratoj ricevos nomon Esperanto aŭ Zamenhof, ĉar la komisionoj al kiuj estas direktitaj la petskriboj ne kunsidas.

La laboro okaze la celebrado de Zamenhof en nia lando estis bona kaj fruktodona. Ĝi kontribuis por disvastigo kaj popularigo de Esperanto.

Gvidanto de la fako Informado :
N. Nikolov

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 29-a de februaro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2460	99.60
2.	Britujo	6565	5512	83.96
3.	Nederlando	5093	4255	83.55
4.	Svislando	2075	1615	77.83
5.	Finnlando	2515	1890	75.15
6.	Francujo	7111	5016	70.54
7.	Svedujo	6605	4265	64.57
8.	Usono	3430	2205	64.29
9.	Danlando	2921	1725	59.06
10.	Germanujo	7450	4335	58.19
11.	Norvegujo	2035	1055	51.84
12.	Hispanujo	2837	1465	51.64
13.	Italujo	4469	2235	50.01

14.	Belgujo	1985	763	38.44
15.	Jugoslavio	7155	2565	35.85
16.	Brazilo	8260	1681	20.35
17.	Pollando	9045	1670	18.46

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	615	520	84.55
2.	Israelo	250	190	76.—
3.	Aŭstralio	1076	661	61.43
4.	Aŭstrujo	1425	875	61.40
5.	Sudafriko	250	140	56.—
6.	Portugalujo	575	270	46.96
7.	Urugvajo	255	110	43.14
8.	Madagaskaro	250	87	34.80
9.	Maroko	256	70	27.34
10.	Novzelando	989	270	27.30
11.	Argentino	815	130	15.95
12.	Islando	270	40	14.81

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

KORESPONDILUDO INTER ŜAKKLUBOJ PER ESPERANTO.

Inter la ŝakaj aktivecoj prenas la korespondludo gravan lokon, aŭ se temas pri individua ludado inter du ŝakamikoj aŭ pri ludado en grupoj, turniroj kun konkurso pri premioj, pasigo en pli altan klason ktp.

Estas por ni esperantistoj tute klare, ke la internaciaj korespondturniroj, kiuj uzas Esperanton, estas la plej raciaj, interesaj kaj valoraj, ĉar la ludantoj povas laŭbezzone libere interŝanĝi pensojn, ne limigante sin je nura indiko pri movoj kune kun kelkaj ŝablonaj salutvortoj.

En EŜLI ni antaŭ tri jaroj iniciatis specialan korespondturniron, kiu povas bone propagandi Esperanton inter la ŝakludantoj kaj eble pligrandigi la aron de esperantistaj korespondludantoj. Temas pri korespondludado inter diverslandaj ordinaraj ŝakkluboj kun Esperanto kiel peranta lingvo.

Anoj el iu klubo formas teamon po 5 ludantoj, el kiuj iu esperantisto estas peranto pri la korespondado kun alia(j) klubo(j). Li kolektas la movojn de la teamanoj, sendas ilin al la perantoj por la kontraŭuloj, donas necesajn klarigojn kaj ĉe la fino de la partio aŭ la turniro eventuale interŝanĝas pensojn pri teoriaj demandoj ktp.

La iniciato estas de s-ro Sven Ziegler, Kopenhago, kiu ellaboris planon por tia turniro. Laŭ tiu plano ĉiu klubteamo povas esti rigardata en la turnirtabelo kiel individuo, tiel ke ĉiu ludanto ludas nur unu partion dum la tuta turniro, kiu do bezonas relative mallongan tempon por la plenumo. La ludado en kiu partoprenas ekz. 6 kluboj, okazas laŭ sekvanta skemo (A, B, C... estas kluboj, 1, 2, 3... estas ludantoj).

A1 — E1	B1 — D1	C1 — Ĉ1	A2 — B2	D2 — C2
E2 — Ĉ2	C3 — A3	B3 — E3	Ĉ3 — D3	A4 — Ĉ4
B4 — C4	E4 — D4	D5 — A5	Ĉ5 — B5	C5 — E5

Ni sukcesis interkontaktigi 6 klubojn : en Danujo, Hispanujo, Okcident-Germanujo, Orient-Germanujo, Portugalujo kaj Svedujo. Pro amasiĝantaj malfacilaĵoj kaj malhelpoj lastmomente ni ne povis starti plennombre. Nur du kluboj ekludis laŭ la peranto-sistemo : klubo en Hispanujo (Barcelona) kaj en Svedujo (Präsebo). La ludado daŭriĝis kun granda intereso, kaj nun ni en kelkaj partioj estas en la finludo, ĉiam kun sama vivanta ŝakentuziasmo.

La konkludo estas, ke la ideo estas inda je ĉia subteno de la esperantistoj-ŝakamikoj, por ke ni baldaŭ povu — sen supremenciitaj obstakloj — fari duan provon pri tia interkluba korespondturniro, kiu alterne al ordinaraj korespondturniroj povas pliriĉigi la internacian ŝakvivon. Ĉiu faru en sia loko sian plejebelon por grupigi kaj inte-

resigi klubteamon pretan por serioze ludi laŭ la suprenomita turnirsistemo.

Torsten Lindberg

UNUA KONTAKTO INTER EŜLI KAJ FIDE.

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia sendis baldaŭ post sia stariĝo leteron al F.I.D.E. (Internacia federacio de ŝakistoj), anoncanta grupigon de esp.ŝakistoj kaj klarigante celon de EŜLI. Komence de junio venis al EŜLI jena respondo de FIDE (en traduko) : "Estimata sinjoro prezidanto ! Mi dankas vin pro via letero de 5.IV. kaj pro la interesaj informoj pri via asocio, kiujn vi komunikis. Mi informas vin, ke ni en F.I.D.E. sekvas kun simpatio vian laboron al proksimigo de homaro kaj ke ni notis kun danko vian proponon pri kunlaboro kun F.I.D.E. kaj ankaŭ vian promeson informadi min regule pri aktiveco de via asocio. Bonvolu akcepti, estimata sinjoro prezidanto, miajn elkorajn salutojn. Folke Rogard, prezidanto de F.I.D.E."


EŜLI ALIĜIS AL UEA

La komitato de EŜLI decidis, ke EŜLI fariĝu plej baldaŭ kunlaboranta asocio de UEA. Ni ĝojas, ke ni povas informi esp. ŝakistojn, ke UEA akceptis nin inter siajn kunlaborantajn asociojn. Tio signifas gravan apogon de nia laboro flanke de tuta Esperanto-movado.

Problemo n-ro 8

G. Heathcote en "The Field" 1889

Mato en 3 movoj.



Kontrolo : Bl. : Rb3, Dh7, Kc5, Ĉa4, Ĉg6 p. : d2 (entute 6).

Ni. : Re6, Ĉc7, p. : f6,h2 (entute 4).

Solvojn sendu ĝis fino de tria monato post apero al gvidanto de la rubriko.

Grava Enketo

La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj deziras efektiviĝi enketon, kiu grave helpas la propagandon pri nia lingvo : temas pri la instruado de Esperanto en la blindullernejoj de la tuta mondo. Ni do petas, ke ĉiu persono sciante ion pri la afero bonvolu respondi kiel eble plej baldaŭ al la jena demandaro :

Pri la Lernejo :

- (I) nomo kaj adreso;
- (II) grado kaj suma nombro da gelernantoj;
- (III) kategorio : ŝtata, privata, k.s.

Pri la Kurso :

- (I) naturo : oficiala, deviga,
- (II) nivelo : elementa, perfektiga,
- (III) daŭro kaj ofteco;
- (IV) metodo : rekta, gramatika, aktiva, ktp.;
- (V) celo : legado, korespondado, akiro de diplomoj.

Pri la Gelernantoj :

- (I) sekso;
- (II) nombro;
- (III) meza aĝo;
- (IV) nivelo : ĉu ekzemple ili lernas alian lingvon ? Kiun profesion ili preparas ?

Pri la Instruisto :

- (I) ĉu blinda aŭ vidanta ?
- (II) ĉu profesia instruisto de la lernejo (pri kiu fako ?), aŭ alia persono ?
- (III) eventuale : nomo.

Pri la rezultoj aŭ aliaj temoj rilate la aferon.

Aldonu ĉiun detalon, kiu al vi ŝajnas interesa. Sed se vi ne povas respondi certe pri ĉiu punkto, bonvolu almenaŭ konigi tion, kion vi scias. La respondojn bonvolu sendi al la Helpsekretario de L.I.B.E. : F-ino E. Woodget, 5 Pembroke Place, London, W.2, Anglujo.

Koran antaŭdankon al la helpontoj.

Novaj Libro

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

PINTA KRAJONO* de Reto Rossetti. *Beletraj kajeroj de Stafeto, n-ro 2. Dekoracioj de Paul Klee; kovrilo de John Hartley. Eld. J. Régulo, La Laguna, 1960. 130p. 19 × 12. Prezo: 4 gld.; 16 steloj.*

La nova beletra serio de Stafeto, en kiu "Pinta krajono" estas la dua numero, estas belege presita en oportuna kaj agrabla formato, kun elegantaj prestipoj, bonkvalita papero, kaj frappe alloga kovrildesegno. Krom tio, "Pinta krajono" enhavas dekoraciojn de la mondkonata artisto Paul Klee. Ĉio ĉi plezurigas, eĉ antaŭ ol oni ekleigas la enhavon. Kaj, kompreneble, la enhavo ne malpli plezurigas. La verkoj de Reto Rossetti apenaŭ plu bezonas rekomendon, tamen mi registru, ke tiun ĉi libron mi firme rekomendas al ĉiuj esperantistoj kiel ion valoran, ĝuindan kaj — eventuale — instruon.

"Pinta krajono" estas la dua poemaro de Rossetti, kaj ĝi aperas ok jarojn post "Oaze", lia majstra kontribuo al "Kvaropo". Mi bedaŭras nur tion, ke Rossetti relative malabunde verkas. Sed kompanse ni ricevas verajn modelojn de klara lingvaĵo kaj flua versarto. Tiu ĉi poeto (mi scias laŭ persona sperto) senĉese poluradas siajn versojn, ŝanĝante kaj pliglatingante ilin, ĝis la momento mem de la presigo. Guste pro tiu zorga, sindona reviziado, la rezultintaj poemoj havas maloftan, preskaŭ unikan, sonoron kaj glatecon. Per sia penado, Rossetti ŝparas penon al la leganto. Oni povas diri, ke la versoj "fluas kiel bona prozo" — sed vere, kiel tre bona, tro malofte trovebla, prozo. Plastike kaj aŭdace Rossetti utiligas la semantikajn eblecojn de la esperanta vortprovizo, kaj sin tute ne limigas je la hazardaj hiatoj de ia nacilingvo:

Ĉi mondvaginta Odise'
jam sole per leteroj velas.
Ĉu korojn do vi filatelas,
ho kore-sponta korife'?

(Paĉjo, p. 26).

(Certe vi kaptas la senc-aludon *kore-sponta-koresponda*? — jen alia agrable tipa karakterizo de la Rossetti-a lingvouzo.) Kelkaj aliaj ekzemploj de lia vortpreteco kaj trafa lingvosento: *la dolĉaj fagoj, kiuj nin aleas* (p. 60); *ni striglas la urbajn stratojn* (p. 60); *kial vin ridigas, se hundo pozas pipon* (p. 106); *pensu kare pri* (p. 91); *kun kurba envio* (p. 49); *anstataŭ branĉoj,*

fera krad' aĵuras (p. 102). Poeton karakterizas lia lingvaĵo, kaj Rossetti majstre manipulas la lingvon. Sed (laŭ Aristotelo) poeton oni rekonas ankaŭ laŭ liaj figuroj. Figura lingvaĵo celas vigligi la impreson kaj bildigi la temon por la leganto, kaj trafaj figuroj abundas en la verkoj de Rossetti. Per la okuloj de pentristo li rigardas la mondon, kaj pri tiu mondo vortpenikas por ni trafajn impresojn (vd. ekz-e lian priskribon de la gibono, p. 103), kiuj subite rivelas al ni multon, kion ni, miopaj, kvazaŭ preteratentas.

Kaj la nova kolekto? Kia ĝi estas? Sendube la ĉefaĵo estas poemciklo "Mestizo de la mondo", serio de 17 poemetoj (krom enkonduka kaj pardonpeta rondeloj) ĉirkaŭ la temo: la homo kaj la belo. Ĉi poemetoj estas verkitaj per tercinoj, kaj konsistas pliparte el po 13 versoj (formo, kiun oni komencas rekoni sub la nomo *dektrio*), kvankam trifoje ili plilongiĝis ĝis po 16 versoj. Mallonge, la tezo estas jena: ke la Homo, racie rigardate, estas fizike tre malbela kompare kun aliaj bestoj, ekz-e la orangutango, gibono, cigno, gazelo, pantero, k.s., (ĉar, interalie, ili estas pli taŭge adaptitaj al la postuloj de sia ĉirkaŭaĵo); sed kompanse ĝi estas la sola, kiu konscie *kreas* belon, t.e. strebas al la belo, pere de siaj artverkoj. Mi ne povas diri, ke mi konsentas tiun tezon (laŭ mi, nenio estas tiel bela, kiel bela virino — finfine, la belo mem estas ja pure *homa* koncepto), sed konsento kaj malkonsento tute ne koncernas la poezion; kerne estas, ke la poeto prezentas sian temon per brila arto, ĉu lia humoro estas simpatia:

En ĉiu homo brulas la dilemo
sin apartigi, tamen aparteni.
Ho mikso de izolo kaj gregemo!
aŭ ciniketa:
Ĉi lipoj, ravo por la donjuano,
kio do estas por rigardo sobra?
— Okazaj kuspoj de la muk-
membrano!

La dua pli longa verko en tiu ĉi volumeto estas la "Jubilea eposo": verhistorio, kiu skizas la evoluon de la movado ĝis 1955. Laŭ sia naturo (ĝi estis verkita por viva teatra prezento en Bolonjo), ĉi verko ne povas esti, krom ie-tie en mallongaj partoj, poezie altvalora; sed altgrade leginda ĝi estas, kaj donas tre agrablan kaj (por la studanto) utilan superrigardon

tra la ĉefaj etapoj de la esperantismo.

La ceteron de la volumo plenigas tre agrable diversaj pli mallongaj pecoj: liriko, versfabloj, rimportretaj rondeloj, parodioj, kaj (al mi tute aparte plaĉas) iom satirecaj infanrimaĵoj, el kiuj mi ne povas ne citi almenaŭ unu:

Brava Douglas
fajras, kuglas
en la norda neĝo.
Ek al Jalu!
— sed ne falu
pum! de via seĝo!

Ĉio kune ni konstatas, ke la eldonejo Stafeto ankoraŭ unufoje serioze riĉigis la belliteraturon de la Internacia Lingvo per verko, kiun (pro la unika voĉo de la poeto) ni rajtas nomi unika.

W. Auld

VOCABULARIO ESPAÑOL-ESPERANTO de E. Tudela Flores. Prologo de R. Herrea Arroyo. Valencia 1956, 21 × 13,5 cm. 232 pĝ. Prezo: 65 pesetoj.

VOCABULARIO ESPERANTO-ESPAÑOL de la sama. Prologo ankaŭ de R. H. A. Valencia 1959. 21 × 15,5 cm. 176 pĝ. Prezo: 70 pesetoj.

Studemuloj de Esperanto en hispanparolantaj landoj ĉiam renkontis la obstaklon, ke al ili mankas taŭgaj studiloj por la plena posedo de la Internacia Lingvo. Vere neniam en tiuj landoj oni havis okazon disponi aŭtoritate seriozajn manlibrojn, kiuj kondukus interesitojn al plena kaj profunda kono de nia lingvo. Mi havigis al mi preskaŭ ĉiujn gramatikojn kaj vortarojn, aperintajn en Hispanujo kaj hispanparolanta Ameriko, kaj mi povas veaserti, ke apenaŭ oni povus trovi en alia lingva areo similajn ekzemplojn de diletantismo kaj improvizismo. Nur antaŭ ĉirkaŭ 55 jaroj S-roj Inglada Ors kaj López Villanueva faris por sia tempo tre atentindan laboron, ĉar ja tiam oni ne disponis la leksikologiajn kompilaĵojn, kiujn nuna vortaristo povas konsulti.

Tial estas notinda la merita klopodo de S-ro Tudela, kiu en 1956 eldonis la hispanan-esperantan parton kaj en 1959 la esperantan-hispanan de nova duobla vortaro por hispanparolantaj popoloj. Kiam aperis la unua volumo mi faris hispanlingvan recenzon pri ĝi, kiu aperis en "Boletín" de HEF. Tie mi iom severe kritikis tiun parton, kiun mi trovis nesufiĉe tralaborita. Al mi ŝajnis, ke tiu unua volumo enhavis, apud grandega bonvolo, vere gravajn didaktikajn mankojn. Tiam mi diris, ke pro la aluvia karaktero ĉe la esperantaj ekvivalentoj de la hispanaj vortoj, la vortaro, pli ol helpi, povus erarigi nematurajn studemulojn, ĉar ja tie nemalofte aperas, egalrangigitaj, fundamentaj vortoj apud freŝbakitaj neologismoj, kaj novulo povus — kion mi dume plurfoje konstatis ĉe miaj gelernantoj — miselekti kaj maltrafi.

Sed nun la dua parto aperas metode prezentita, kun indikoj pri fundamen-

taj, oficialaj, PV-aj kaj alidevenaj vortoj. La tradukoj en la hispanan estas ĝenerale bonaj, kaj modera nombro de pluzataj kunmetaĵoj sub multaj radikoj kontentige kunhelpas ordinaran uzanton. Tio estas tre bona, ĉar nun lerta studanto povas orientiĝi ankaŭ en la unua parto, kaj selekti, kiam necese, uzotajn vortojn. Tiu ĉi dua parto do inde kaj plibonige koherigas kaj komplementas, eĉ se iel ŝlosile, la vortaron kiel tutaĵon.

La leksikologio de Esperantujo ricevis lastatempe tre seriozajn aldonojn, ekzemple Nylén, *Esperantisk-Svensk ordbok*, 1954; Butin kaj Sommer, *Wörterbuch Esperanto-Deutsch*, 1954; Wingen, *Wörterbuch Deutsch-Esperanto*, 1955; Waringhien, *Grand Dictionnaire Espéranto-Français*, 1957; Živanović kaj Gjivoje, *Rečnik Esperantsko-Srpskohrvatski*, 1959, ktp. Temas pri imitindaj ekzemploj de dulingvaj ĝisdatigitaj vortaroj, kies paralelo por la hispana ankoraŭ estas dezirataĵo.

Tamen la dua parto de la vortaro de D-ro Tudela, aranĝita laŭ pli rigora kaj pli postulema kriterio ol la unua, jam estas survoje al la respondeca leksikologio, kiun Esperantujo postulas. Certe tiun ĉi vortaron (kaj en pli granda mezuro ĝian unuan parton) oni povos plibonigi — eĉ superi —; sed neniam oni povos malestimigi la pozitivan servon, kiun D-ro Tudela faris al la hispanlingva esperantistaro, provizante ĝin per tiu ĉi ampleksa laboro.

Se tipografio kaj formato estas iom primitive aranĝitaj, kompare kun la nuntempaj eŭropaj modeloj supre cititaj, la papero, ĉefe en la dua parto, estas bona, eĉ se broŝurita aranĝo apenaŭ taŭgas por vortaro. Espereble 2-a eldono, tralaborita kaj ĝisdatigita, donos en baldaŭa estonto la aŭtoritatan duoblan dulingvan vortaron, kiun hispanlingvanoj delonge sopiras. Marinko Gjivoje montris al ni, kiel 2-a eldono, surbaze de unua honeste farita, povas eminente sukcesi. Tiu 2-a eldono estu la danko krono, kiun la bonvolo kaj honesta laboro de D-ro Tudela nepre meritas.

J. Régulo Pérez

REČNIK ESPERANTSKO-SRPSKO-HRVATSKI de Stevan Živanović, kompletigita de Marinko Gjivoje, eld. *Naučna Knjiga Beograd*, 1959, 238 p. 17,5 × 12,5, prezo neindikita.

Tio ĉi estas la tria eldono de la bonega vortaro Esperanta-Serbakroata, kiun antaŭ 26 jaroj kunmetis Stevan Živanović kaj kiu multege kontribuis al la disvastiĝo de Esperanto en Jugoslavio. La nuna eldono, publikigita en 5.000 ekzempleroj, estas konsiderinde kompletigita de Marinko Gjivoje, unu el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj en Jugoslavio. En la vortaro troviĝas ĉiuj vortoj, kiujn entenas la Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento, sed, krome, 1530 pliaj radikoj. Tiamaniere la nuna vortaro havas entute ĉ. 9.400 vortradikojn kompare kun ĉ. 6.800 de

la antaŭa eldono. En ĝi troviĝas, plue, ĉ. 4.620 derivitaj vortoj. La verko de Gjivoje do estas unu el la plej kompletaj, plej modernaj kaj plej bonaj Esperanto-nacilingvaj vortaroj. La fakto, ke ĝi estas eldonita de grava neesperantista entrepreno "Naučna Knjiga" (Scienca Libro) sendube kontribuas al ĝia graveco kaj al plia altigo de la prestiĝo de la Internacia Lingvo en tiu lando.

Ekzemplo de imitinda lingva disciplino: Kvankam M. Gjivoje malkonsentas pri la formoj fezo, guzlo, lazo, reprezalio kaj preferus la formojn feso, guslo, represalio, laso, tamen li lasis tiujn formojn neŝanĝitaj opiniante, ke "aŭtoro de vortaro ne rajtas laŭ sia persona gusto ŝanĝadi radikojn, kiuj per uzado dum jardekoj akiris firman grundon en ia lingvo". Li ankaŭ atentigis, ke la difinoj de *sardelo* kaj *sardino* en la P.V. devus esti inversaj, sed tamen tradukis la du difinojn idente al la P.V. por ne endanĝerigi la lingvounuecon.

En Jugoslavio ankoraŭ mankas bona nacilingva-esperanta vortaro, sed espereble oni baldaŭ trovos eldoniston ankaŭ por ĝi, ĉar la manuskripto estas jam preta.

I. L.

EKSURSO EN NOMBROJ* de F. Emerson Andrews, eld. de *The Duodecimal Society of America*, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y., Usono. Prezo: 0,40 gld.; 1,80 steloj.

La eldona societo estas volontula senprofita organizo por scienca esplorado kaj edukado de la publiko en la uzo de 12 en la kalkulado, matematiko, pezoj kaj mezuroj kaj aliaj branĉoj de pura kaj aplikata scienco.

La kajero 16-paĝa estas populara enkonduko en la 12-nombran sistemon, kiu laŭ multaj vidpunktoj estas preferinda antaŭ nia ĝisnuna 10-nombra sistemo. Evt. transiro estas nur reveno al la malnova hinda sistemo, kaj la transiron malhelpas nur la inerto de la homoj kaj de la sciencistoj, oni asertas. — En ĉiu okazo la studado de la kajero estas vere interesa, eĉ amuzo. — Unuopaj ekzempleroj sendotaj senpage. Pli grandaj mendoj: ekz. po 10.

H. E. Jensen

EL LA VIVO DE NETAŬGULO* de Joseph Eichendorff, eld. *Esp-Eldonejo Limburger Vereinsdruckerei - Limburg - Germ.* - 140-paĝa bela libro kun ĉarmaj, facilaj desegaĵoj de Lisa Beyer-Jatzlau, trad. de Paul Benne-mann. Prezo: 4,80 gld.; 19,20 steloj.

Tiu ĉefverko de Eichendorff (1788-1857) estas verkita 1826 kaj estas tipa esprimo de la sonĝo de la pli malfrua romantiko — pri la ideala, senzorga, poezia juneco. La principoj de la romantiko respondas al neniam tute sufokebla emo en la homa animo, kaj E. en sia verko donas ĉion. La Aladdin-tipo, la mistiko, la naturĝojo, la amo

kaj la fina feliĉo, kiu igas la sonĝon realigi. — Eĉ prudenta, moderna homo povas esti kaptata de la sorĉado de la libro. La desegnaĵoj bone helpas.

H. E. Jensen

NAŬTAGA PREĜO AL LA SANKTA VIRGULINO DE LA ROZARIO DE POMPEI. — Verkis komandoro Bartolo Longo, trad. d-ro Jozefo Koch, prof. de Esperanto. Eld. Pontifika Preslernejo, Pompei 1940. — Senpage fordonata al homoj, kiuj donas malgrandan moneron al la institucio.

Tiu naŭtaga preĝo estas verkita en 1879 dum tre severa malsano por atingi helpon de la Sankta Virgulino. Post la resaniĝo de la aŭtoro aliaj homoj uzis ĝin kaj sentis sin helpitaj. Iom post iom ĝi estis tradukita en 22 lingvojn kaj fine en Esperanton.

H. E. Jensen

INFANOJ DE L'ATOMBOMBO* de Osada Arata. 2-a eldono (Japana Librokooperativo) kun 6 fotoj kaj titolbildo impresigaj. 72-paĝa modesta libreto kun antaŭparolo de la kompilinto. Prezo: 2.— gld.; 8 steloj.

La enhavo estas vico da malgrandaj disertacioj de Hiroŝima-infanoj, kiuj kortuŝe rakontas pri siaj memoraĵoj el la terurega tempo de l'eksplozo. La celo estas vekado de tutmonda kontraŭvolo al la milito, kreado de forta paca volo. Korŝira legaĵo, kiu meritas vastan konatecon.

H. E. Jensen

Nekrologo

La 25-an de januaro mortis en Svedujo la Esperanto-verkisto **Stellan Engholm**, konata de ĉiu esperantisto pro siaj verkaĵoj. El la originalaj verkoj ni povas mencii: "Al Torento", "Homoj sur la Tero" kaj "Infanoj en Torento", kaj krome li tradukis verkaĵojn de Selma Lagerlöf kaj André. Stellan Engholm estis aktiva ankaŭ kiel redaktoro kaj prelegisto, kaj entute li faris por Esperanto valoran kulturan laboron.

La 10-an de februaro 1960, mortis en la aĝo de 84 jaroj **Carl Barthel, Frankfurt/Main**. Li eklernis Esperanton en 1904, kaj la 30-an de septembro 1904 S-ro Barthel kune kun aliaj fondis la Frankfurтан Esp-grupon, unu el la unuaj en la tuta mondo. Li partoprenis la unuan "UK"-kongreson en Bulonjo en 1905. Tie li renkontis D-ron Zamenhof, kun kiu li poste korespondis. Li estis portanto de la ora Esperanto-Insigno kaj de la Honora Stelo "Pro la Merito", honora membro de la Germana Esperanta-Asocio kaj Honora Prezidanto de la Esperanto-Societo Frankfurt/Main.

S-ro **L. Doménech, Barcelona**, kiu faris belan Zamenhof-buston, mortis jam en septembro pasintjare.



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 10 Februaro 1960

Oficiala antaŭkongreso :

Oni ricevas informojn pri la Oficiala Antaŭkongreso en Arnhem (de la 27-a ĝis la 29-a de julio 1960) ĉe la sekretario : S-ro H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem (Nederlando).

Junula vespero :

La Loka Kongresa Komitato invitis la Esperantistan Jaz-orkestron el Ljubljana ludi en la kadro de la Junula Vespero, kiu dum la Universala Kongreso estos rezervita al gekongresanoj ĝis 25 jaroj.

Novaj fakkunvenoj :

Anoncis fakkunvenon :

— Veterana Esperantista Klubo : "La fruara aktiveco de la pioniroj". Adreso : S-ro Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave, Dunstable 674, Britujo.

— Eŭropa Lingvo-Kampanjo : "Historio kaj nuna stato de la eŭropa integriĝo". Adreso : D-ro Wilhelm Herrmann, Bürstadtstr. 3, Lampertheim/Hessen, Germanujo.

Fervoja rabato :

La belgaj fervojoj asignis 25%-an rabaton al ĉiuj kongresanoj, kiuj partoprenos en la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo.

Stipendioj por la Universala Kongreso:

Brita Esperantista Asocio asignis du senpagajn aliĝojn kaj premiojn de 25.-anglaj pundoj al konkurso por gejunuloj de la Junulara Sekcio de B.E.A.

Foto-ekspozicio :

La Loka Kongresa Komitato decidis organizi internacian ekspozicion de fotografaĵoj okaze de la 45-a Universala Kongreso en Bruselo, kun premioj de diversaj grandaj foto-firmaoj de Belgujo. Per tia unuafoja ekspozicio L.K.K. esperas respeguligi la internaciecon de Esperanto.

Regularo :

1. Povas konkursi ĉiu esperantisto, kiu estas individua aŭ asocia membro de U.E.A.
2. Ĉiuj temoj estas allasataj.
3. La bildoj devas esti faritaj je formato de minimume 24 × 30 cm. kaj sur blanka paperspeco.
4. La bildoj ne estu enkadritaj.
5. Sur la dorsflanko de la bildo troviĝu la nomo kaj adreso de la ensendinto kaj, eventuale la titolo de la verko. Prefere la verkoj estu senditaj kiel presaĵo, kun la mencio : "Fotoj por ekspozicio — sen komerca valoro".
6. La fotoj devas esti senditaj al :

S-ro G. Debrouwere

Magdalenastraat 29

Kortrijk (Belgujo).

plej laste la 30-an de junio 1960.

7. La alsenditaj fotoj restos propraĵo de L.K.K., sed estos eventuale uzataj nur post interkonsento kaj kun mencio de la nomo de la alsendinto, escepte por publikigo en la Esperanto-periodaĵoj, por kio la nura mencio sufiĉas.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 11 Marto 1960

Kongresa sonbendo :

Jenaj Esperanto-Societoj ĝis fino de februaro mendis la kongresan sonbendon : Angers, Wattrelos (Francujo), Moyá (Hispanujo), Trelleborg (Svedujo), Varsovio (Pollando), Bad Hersfeld, Hannover, Esslingen, Bammental, Wuppertal, Blieskastel/Saar (Germanujo), Hago (Nederlando), Horsens (Danlando), Nové Zámky (Ĉeĥoslovakio), Nova Zagora, Pazarĝik (Bulgario), Torino (Italujo).

Fakaj kunvenoj :

Mendis Fakkunvenon :

— Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Adreso : D-ro Rudolf Klimek, ul. Braterska 18, Pollando.

— Budhana Ligo Esperantista. Adreso : S-ro M. Bury, Poŝtkesto 89, Lieĝo I, Belgujo.

Katolika diservo :

La katolika diservo okazos en la Preĝejo S. Gudulo. Pastro Edmond Rohen predikos pri "La Universala tasko de la Eklezio".

Teatra vespero :

La Internacia Arta Teatro gvidata de S-ro S. Flego ludos en Esperanto por la kongresanoj la triaktan komedion de Goldoni "Kurioza okazaĵo".

Adoptaj patroj :

Aliĝis al la "adoptata patro" :

Reĝa Belga Ligo Esperantista, S-ro M. Jaumotte, S-ino M. Jaumotte, F-ino Viviane Jaumotte, Esp. Societo "La Verda Stelo", F-ino M. Hofkens, F-ino H. Hofkens, F-ino B. Geers, S-ino L. Merck (ĉiuj el Antverpeno), Esp. Soc. de Vervie, S-ro L. Minnaja (Romo), S-ro F. Galbusera (Verona), Esp. Soc. de Bonn, Esp. Soc. "Verda Nordo" (Berlino), Esp. Soc. de Ystad (Svedujo), Esp. Soc. de Croydon (Britujo). Donacon faris la Esp. Soc. de Hamburgo. Entute 19 Adoptaj Patroj. La "Operacio Adoptaj Patroj" ĝis nun kolektis 7.719.- b.fr. Du infanoj el

Pollando jam estas invitataj partopreni kiel gastoj en la Infana Kongreseto.

Statistiko :

(ĝis fino de februaro) Alĝerio 4, Antiloj nederlandaj 1, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 9, Belgujo 207, Brazilo 4, Britujo 125, Bulgario 9, Ĉeĥoslovakio 1, Cejlono 1, Danlando 30, Finnlando 11, Francujo 147, Germanujo 114, Hispanujo 9, Hungarujo 1, Italujo 56, Japanujo 3, Jugoslavio 32, Meksiko 1, Kongo belga 2, Monako 7, Nederlando 136, Norvegujo 10, Novze-lando 6, Pollando 58, Portoriko 1, Rumanujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 39, Svisujo 19, Turkujo 1, Unuiĝinta Arabio 1, Urugvajo 1, Usono 7. Entute 1057 kongresanoj el 36 landoj.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

KUNVENOJ de I.L.E.I. dum la 45-a Universala Kongreso, en Bruselo.

I) PUBLIKA AFERKUNVENO

"AGADO NUNTEMPA por PROGRESIGI ESPERANTON en la LERNEJOJ. a) Ĉe la publiko b) en la lernejoj mem (aktualaj spertoj)".

II) PUBLIKA PEDAGOGIA DISKUTADO

"EDUKADO kaj la EDUKATOJ—ĉu la lernejoj ĝuas la lernejan vivon laŭ via nuntempa eduka sistemo, aŭ ĉu ĝi estas nur necesa sperto?"

Pritraktindaj punktoj : a) lerneja programo je diversaj aĝoj - ŝato aŭ malŝato al studobjektoj, b) uzo de radio kaj televido, c) influo de ekzamenoj, d) personeco de instruisto, e) lernejoj konstruaĵoj, f) sporto kaj kluboj, g) kamaradeco. Kiel kutime la celoj de la kunvenoj estas konatigi la geinstruistojn diverslandajn, diskonigi aktivajn en la Esperanta fako, kaj pritrakti ĝeneralan edukan temon, kiu interkomprenigos niajn gekolegojn kaj la edukajn sistemojn, laŭ kiuj ili laboras.

La Sekretario de I.L.E.I. F-ino V. C. Nixon, B.A. 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo, volonte ricevos proponojn pri partoprenado aŭ skribitajn kontribuojn.

13-a KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA EN 1960

La ĉi jara kongreso de K.E.L.I. okazos en HEDENESSE ĉe CADZAND en Nederlando, sur la sojlo de Flandrujo.

Ĝi okazos tuj antaŭ la U.K. en Bruselo, de la 23-a ĝis la 30-a de julio. Ni kore bonvenigas vin.

Ĉeftemo de la kongreso estos :

"AKTUALAJ PROBLEMOJ EN LA VIVO DE LA KRISTANO"

Krome okazos bibliaj studoj, distraj kunvenoj, filmprezentadoj kaj ekskursoj al nederlandaj kaj belgaj banlokoj kaj al la fama belga urbo Bruĝo. Prezo de la partoprenado en la tuta

kongreso, inkluzive de restado, manĝado, tranoktado kaj unu tuttaga ekskurso estas 80.— ned. gld. Informojn donos al vi :

*F-ino Tini Putto,
Bennekomseweg 20,
EDE (Gld.) NEDERLANDO*

INTERNACIA RENKONTIĜO

Instige de U.E.F., la grupo "BONA STELO" 31, rue Pêcherie ROMANS (Drôme) FRANCUJO organizas internacian antaŭkongreson de la 23-a ĝis la 29-a de julio, en la montregiono VERCORS, kie okazos la XXI-a renkontiĝo de la Internacia Federacio de Tendumado per tendoj kaj loĝveturiloj.

VERCORS estas tre pitoreska regiono de la Antaŭalpoj kun pintoj ĝis 2500 metroj altaj super marnivelo. La loko de la tendejo estas vastaj herbejoj (420.000 kvadrataj metroj) alteco 1000 metroj, meze de la majesta "ARBARO DE LENTE" apud Saint Jean en Royans. Ĝi estas facile atingebla per belaj, modernaj, asfaltitaj vojoj. Aliĝoj ĝis la 1-a de junio 1960 : 1 persono = 5 N.F. (15 Steloj) por junuloj malpli ol 21-jaraj : duona prezo, por junuloj malpli ol 15-jaraj : senpage.

Aliĝoj kaj pliaj informoj ĉe BONA STELO, 31, rue Pêcherie, ROMANS (Drôme), FRANCUJO.

Vegetaranoj — kiuj partoprenos la 16-an Internacian Vegetaranan Kongreson en Hanover, Germanujo, dum aŭg. 1960 — bonvolu kontakti baldaŭe s-ron T. W. Teich O.N. Postfach 121 (22a) M. Gladbach. (membro de TEVA).

LA POŝTMARKKOLEKTADO

Statistiko la unuan de aprilo : 3600 steloj. Sendu daŭre al

*P. Zacho, Randbølvej 4,
Kopenhago F.*

LA REDAKCIO

petas pardonon pro la prokrasto de respondoj al la legantoj, kiuj dum la lasta tempo sendis respondendajn leterojn. La kaŭzo estas malsano. Respondo sekvas kiel eble plej baldaŭ.

Kirsten Zacho

UNESCO COURIER

decembra numero 1959 kun grava artikolo pri Zamenhof.

Havebla en angla, franca, hispana kaj rusa lingvoj.
Mendu ĉe UEA. Prezo inkl. sendkoston : 0,50 gld.; 2 steloj.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la januaran numeron.

Ĉiutage	9.00-9.30	Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3 ^o -Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 50.42m, 42.01m, 31.50m, 30.69m, 25.39m. P. Pola Radio, ul. Noakowskiego 24, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79 m. k. Radio Potí, Av. Deodoro 245, Natal, Brazilo.
	14.00-14.15	Piraçununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 41.35m, 39.11 m, 30.93 m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo varia dum unuhora diverslingva programo).
Lundo	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	9.00-9.30	Rio de Janeiro, 318 m. (940 kcs), 61.50 m., 88.5 Mcs. I. P. Radio Jornal do Brasil. Prog. Esperanto, Av. Rio Branco 110, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 402m. (746 kcs) P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien, 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.10m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝtfako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	9.00-9.30	Rio de Janeiro. Kiel lunde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m, 30.98m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.
Vendredo	9.00-9.30	Rio de Janeiro. Kiel lunde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	20.00-20.15	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.
	22.00-22.10	Hilversum 298m. (1007 kcs). I., V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.

Voĉo de Ameriko. 11.00-11.30 (41.90m); 12.00-12.30 (19.72m), 22.00-22.30 (31.28m., 31.01m). Vidu detalojn en la februara numero, paĝo 30. 1-IV, la Usona romano kaj ĝia tradicio; 8-IV, diskutrondo pri la Usona ekonomia sistemo; 15-IV, diskutrondo pri kunlaboro inter la amerikaj nacioj; demandoj kaj respondoj pri Ameriko.

Radio Zagreb. 7-IV, Radio-humoraĵo; 14-IV, Memore al la mortotago de Zamenhof; 21-IV, Sorĉisto el elektrolando; 28-IV, Novaĵoj pri la movado kaj respondoj al korespondantoj.

Radio Roma. 1-IV, Itala kantisto Fred Buscaglione; 5-IV, Tra la literaturo; 8-IV, Leterkesto kaj bibliografio; 12-IV, Novaĵoj el Italujo; 15-IV, la Sankta Vendredo; 19-IV, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-IV, Roma baziliko Sankta Paŭlo; 26-IV, Itala regiono Lukanio; 29-IV, Itala blinda skulptisto E. Masuelli; krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EBENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de marto 1960

N-ro 325

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ por komparo je la fino de februaro 1959 :

	1959	1960
Asociaj membroj	4320	4670
Individuaj membroj		
MJ	564	509
MA	3671	3536
MS	405	423
Pat.	7	3
DM	334	348
HM	46	40
JMJ	13	19
JMA	104	124
	5144	5002
	9464	9672

DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra (A.C.T.) D : S-ro Ross Gordon Robbins, botanikisto, 4 Wild Street Griffith.

Parkes (New South Wales) D : vakas.

Finnlando

Kouvola (Kymen lääni) VD : vakas.

Turku (Turun ja Porin lääni) FD (komerco) : vakas.

Francujo

Bourg-la-Reine (Seine) D : vakas.

FD (statistiko) : vakas.

Niort (Deux-Sevres) FD (internacia korespondado) : vakas.

FD (religioj-teozofio) : vakas.

Paris (Seine) FD (filozofio bhagavad-gita vedanta advajta) : vakas.

Soissons (Aisne) D : vakas.

Germanujo

Bielefeld (Westfalen) D : vakas.

Wieda (Südharz) D : vakas.

Italujo

Brescia (Lombardio) D : vakas.

Messina D : vakas.

Torino (Piemonte) JD : vakas.

Polinezio Franca

Papeete (Tahiti) D : S-ro Jean Ribillard, c/o Arnould B.P. 636.

FD (budhismo) : la D.

Pollando

Bedzin (woj. Katowice) D : vakas.

FD (komerco) : vakas.

Svedujo

Falköping (Västergötland) FD (pacifismo) : vakas.

Gävle (Gastriklane) VD : vakas.

FD (instruado) : vakas.

Usono

Brookfield (Ill.) FD (filatelo) : vakas.

PATRONO 1960

3. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Robbins, D-ro Ross G., Canberra, Aŭstralio.

MEMBRO-SUBTENANTO 1959

523 Möllestad, S-ro Sven, Kramfors, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1960

152 Rapley, S-ro John C., Ruislip, Britujo.

153 Relf, S-ro E. F., Addlestone, Britujo.

154 Ryan, S-ino Jane S., Manchester, Britujo.

155 Saft, S-ro S., Salford, Britujo.

156 Sharp, S-ro G., Bournemouth, Britujo.

157 Smith, S-ro Norman R., London, Britujo.

158 Taylor, F-ino L. M. B., Sounthorpe, Britujo.

159 Virgo, S-ro E. R., Derby, Britujo.

160 Williams, S-ro Norman, Manchester, Britujo.

GENERALO BASTIEN, ne povante respondi individue ĉiujn leterojn, kiujn li ricevis okaze de la 90-a datreveno de sia naskiĝo, tutkore dankas kaj sendas al ĉiuj siajn bondezirojn por ili kaj por la baldaŭa triumfo de nia lingvo.

161 Wiltshire, S-ro A. G., Manchester, Britujo.

162 Worchester, S-ino Doris M., London, Britujo.

163 Jensen, S-ro Gorm Eskjaer, Faxe, Danlando.

164 Lange, S-ro Otto C., Hvidovre, Danlando.

165 Larsen, S-ro L., Odense, Danlando.

166 Lassen, S-ro Aug., København, Danlando.

167 Møller, S-ro Poul, Viborg, Danlando.

168 Marjomaa, S-ro Kalle, Helsinki, Finnlando.

169 Beau, S-ro Jean, Marseille, Francujo.

170 Beliard, S-ro Luc, Nantes, Francujo.

171 Bideau, S-ro A., Dyon, Francujo.

172 Lemonnier, F-ino Germaine, Asnières, Francujo.

173 Magaud, S-ino, Villeurbanne, Francujo.

174 Prud'hon, S-ro G., Fontenay, Francujo.

175 Verot, S-ro F., St. Etienne, Francujo.

176 Yelland, S-ro E. E., Apremont, Francujo.

177 Barkhausen, S-ro Heinz, Bremen, Germanujo.

178 Beaucaire, S-ro Louis, Berlin, Germanujo.

179 Carstensen, S-ro Th., Ahrensboök, Germanujo.

180 Flick, S-ro Werner, Münster, Germanujo.

181 Fritsch, D-ro Erdmann, Langelsheim, Germanujo.

182 Gerwin, S-ro R., Lobberich, Germanujo.

183 Grundhoff, S-ro Josef, Wuppertal, Germanujo.

184 Jolliet, S-ro Leo, Wiesbaden, Germanujo.

185 Lamprecht, D-ro Hermann, Essen, Germanujo.

186 Rosenträger, S-ro Hans, Dortmund, Germanujo.

187 Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo.

188 Starke, S-ro Alexander, Nürnberg, Germanujo.

189 Urban, S-ro Walter, Burtenbach, Germanujo.

190 Vosteen, S-ro Karl, Hude, Germanujo.

191 Wetterstein, S-ro August, Welper, Germanujo.

192 Boscarino, S-ro Avv. G. S., Ragusa, Italujo.

193 Campetti, Prof. D-ro Gaetano, Italujo.

194 Rizzo, D-ro Pietro, Catania,

195 Bešlagić, S-ro Agan, Banja Luka, Jugoslavio.
 196 Giunio, S-ro Petro, Zagreb, Jugoslavio.
 197 Janjić, D-ro Fran, Zagreb, Jugoslavio.
 198 Jovanović, S-ro Živojin M., Niš, Jugoslavio.
 199 Marković, S-ro Dragan, Brus, Jugoslavio.
 200 Collins, S-ro Edward, Toronto, Kanado.
 201 Tuch, S-ino R., Toronto, Kanado.
 202 Horácio, S-ro Henriques, Nampula, Mozambiko.
 203 Boelsma, S-ro P. A., Haarlem, Nederlando.
 204 Coppens-Bink, S-ino A. B., Rotterdam, Nederlando.
 205 Knol, D-ro G. T., Coevorden, Nederlando.
 206 Kroon-Rentinck, S-ino J., Eemnes, Nederlando.
 207 Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam, Nederlando.
 208 Woessink, S-ro E. J., Arnhem, Nederlando.
 209 Oliveira, S-ro Bern. Ant. dos Santos de, Lisboa, Portugalujo.
 210 Santos, S-ro Art. H. R. e, Lisboa, Portugalujo.
 211 Semmelink, S-ro J., Pretoria, Sud-Afriko.
 212 Woodruff, S-ro E. W., Johannesburg, Sud-Afriko.
 213 Giannini, S-ro Walter, Zollikerberg, Svislando.
 214 Mijailov, S-ro Serguei, Montevideo, Urugvajo.
 215 Beard, S-ro Ralph H., Staten Island, Usono.
 216 Blackstone, S-ro R., Orlovista, Usono.
 217 Carlson, S-ro F., Seattle, Usono.
 218 Doneis, S-ro A. F., Pharr, Usono.
 219 Eisele, S-ro J., St. Louis, Usono.
 220 Gerber, S-ro Wm., Twin Falls, Usono.
 221 Gould, S-ro Warren, Greenfield, Usono.
 222 Lomo, S-ro Alfonso, New York, Usono.
 223 Nace, S-ro Paul E., Hyattsville, Usono.
 224 Pease, S-ro Rejo, Jersey City, Usono.
 225 Simon, S-ro Werner, Memphis, Usono.
 226 Solzbacher, D-ro William, Washington, Usono.
 227 Smart, S-ro Herbert, Jackson Heights, Usono.
 228 Vidack, S-ro J., Seattle, Usono.
 229 Walker, S-ino Martha, Napa, Usono.
 230 Garcia, S-ro Felix Blázquez, Caracas, Venezuelo.
 231 Collier, S-ro John, Newdegate, Aŭstralio.
 232 Kosutek, S-ro Josef, Sydney, Aŭstralio.
 233 Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge, Belgujo.
 234 Degryse, S-ro André, Roeselare, Belgujo.

235 Amorim, D-ro Nid Dutra d', Salvador, Brazilo.
 236 Araujo, F-ino I. Baggi de, Rio de Janeiro, Brazilo.
 237 Araujo M. Abril, S-ino Irene de, Copacabana, Brazilo.
 238 Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo.
 239 Bondarovsky, S-ro E., Barra Mansa, Brazilo.
 240 Bondarovsky, S-ro S., Barra Mansa, Brazilo.
 241 Braga, S-ro I. Gomes, Rio de Janeiro, Brazilo.
 242 Costa, F-ino Yolanda de Araujo, Rio de Janeiro, Brazilo.
 243 Costa Filho, S-ro Francisco F. da, Rio de Janeiro, Brazilo.
 244 Coutinho, S-ro A. Caetano, Rio de Janeiro, Brazilo.
 245 Dionísio, S-ro Carlos H., São Leopoldo, Brazilo.
 246 Martins, D-ro Lincoln, Belo Horizonte, Brazilo.
 247 Nogueira, S-ro Walter, Rio de Janeiro, Brazilo.
 248 Padúa, S-ro Geraldo A. Gomes de, Belo Horizonte, Brazilo.
 249 Pessoa, S-ro Floriano N. de V., Rio de Janeiro, Brazilo.
 250 Pinto, S-ro José Dias, Santo André, Brazilo.
 251 Rezende, D-ro C., Belo Horizonte, Brazilo.
 252 Real, S-ro Pedro, Paranaíba, Brazilo.
 253 Rosa, S-ro Nerino Della, Americana, Brazilo.
 254 Santos, S-ino Z.C., Teófilo Otoni, Brazilo.
 255 Schembri, F-ino J., Belo Horizonte, Brazilo.
 256 Souza, S-ro Otaviano Curvelo de, Itabuna, Brazilo.
 257 Teixeira, S-ino Lila, Rio de Janeiro, Brazilo.
 258 Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo.
 259 Vianna, D-ro João, Belo Horizonte, Brazilo.
 260 Bachmann, S-ro S. P., Hove, Britujo.
 261 Boatman, S-ro Douglas P., Westcliff-on-Sea, Britujo.
 262 Bowell, F-ino Barbara, Cromhall, Britujo.
 263 Fraser, F-ino R. G. M., Ilford, Britujo.
 264 Garraway, F-ino E., Sheffield, Britujo.
 265 Grocott, S-ro J.R., Blackburn, Britujo.
 266 Hanson, S-ro C. G., Teighmouth, Britujo.
 267 Knight, S-ino E. B., London, Britujo.
 268 Laurie, S-ro E. Jackson, Bournemouth, Britujo.
 269 Laurie, S-ino W., Bournemouth, Britujo.
 270 Leather, S-ro A. J., Blackburn, Britujo.
 271 McDonald, S-ro R. J., Gloucester, Britujo.

272 Mills, F-ino Constance, Denton, Britujo.
 273 Millidge, Pastro R. G., Sutton, Britujo.
 274 Moberly, S-ro E. W., London, Britujo.
 275 Pearson, F-ino E. M., York, Britujo.
 276 Phelan, S-ro H. K., Old Bexley, Britujo.
 277 Pilling, F-ino F., Poulton-Le-Fylde, Britujo.
 278 Pilling, S-ino F. K., Poulton-Le-Fylde, Britujo.
 279 Seddon, S-ino R., Southport, Britujo.
 280 Sly, S-ro Kenneth A., Letchworth, Britujo.
 281 Thornber, S-ro J. C., Accrington, Britujo.
 282 Zeiner, S-ro B. R., Barry, Britujo.
 283 Trier, S-ro Bent Sej, Haslev, Danlando.
 284 Leppänen, S-ro Pekka, Kuopio, Finnlando.
 285 Vuori, S-ro A., Finby, Finnlando.
 286 Dalier, S-ro H., Mauleon, Francujo.
 287 Delahaye, S-ro I., Petitville, Francujo.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 17.954.76 gld.

A. Berdan, Aŭstrujo 1.50 gld.; Jorge Soares das Neves, Brazilo 1.— gld.; Ges. K. Sly, Britujo 10.60 gld.; S-ro Sahardjian, Francujo 15.40 gld.; S-ino Elise Meyerhuber, 13.53 gld., Joh. Wolff, 5.50 gld., Germanujo; J. Herp, 3.50 gld., J. M. 1.— gld., Hispanujo; Giuseppe Caracassa 3.03 gld., D-ro N. Tursi 20.— gld., Italujo; D-ro A. Crnica 0.78 gld., Jugoslavio; N.N. en V., Nederlando 15.— gld.; J. Andjans, Sovetunio 3.60 gld.; Erik Carlen, Svedujo 11.29 gld.; M. Monleon, Venezuelo 4.— gld.

Entute 18.064.49 gld., je 1.3.1960.

Donacu unu milonon — aŭ pli ! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo ! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj ..

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro Rudolf Slivka, Aŭstrujo 1.45 gld., S-ro H. Davies, Britujo 21.16 gld., S-ro Johannes May, Germanujo 4.51 gld., S-ro Hans Ph. Wuenschel, Germanujo 6.77 gld., N.N. en V., Nederlando 2.50 gld., S-ro R. Barta, Usono 6.41 gld., S-ro A. M. Brya, Usono 16.02 gld.

DONACOJ AL OFICEJA ILARO

S-ro Sergio R. Docal, Usono 5.96 gld., N.N. en R., Nederlando 2.50 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

S-ro Friedrich Ebner, Aŭstrujo, 4.35 gld., Ges. K. Sly, Britujo 21.20 gld., S-ino Karla Olsson, Svedujo 10.— gld. Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj manĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1 Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Belga Turista Servo: Ĉian informon turistan prizorgas R. Loeckx, Konijnenperken 108, Bruselo 17, Belgujo, kontraŭ respondkuponon.

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

R. Milton Helsinki. Mi sendis leteron k presajon al via adreso de Franzeninkatu, k la poŝto resendis al mi ilin kun la legendo "inconnu". Bonvolu sciigi al mi vian ekzaktan adreson. García Blázquez.

Letermonaton, aranĝos dum aprilo kursoj de Esperanto en Králíky. Respondo garantiita per faldprospekto aŭ bildkarto. Multaj korespondemuloj. Skribu amase al: Esperanto rondete ĉe OB, Králíky, Ĉeĥoslovakio.

Okaze de la 52-a Nacia Kongreso de Franca Esperantista Unuiĝo en Montélimar la 4, 5 k 6-an de junio 1960 bonvolu sendi ilustritan, filatele afrankitan poŝtkartan por ekspozicio en la Kongresejo. Adreso Nacia Esperanto-Kongreso, Montélimar, Drôme, Francujo.

Aŭstraj kolektamikoj serĉas PM-interŝanĝadon kun gesamideanoj de Bulgarujo, Germanujo, Francujo, Italujo, Nederlando, Svedujo, Svislando, Hungarujo laŭ mankolisto surbaze katalogo Michel aŭ Yvert, kaj novaĵoj, UTK: nominalo. Sendu listojn de Aŭstrujo kaj Germanujo al Ridler, Rosenhügelgasse 35, Wien-Mauer, Aŭstrujo. Ĉiam valide.

Vigla Esp-kurso aranĝos letervesperon en majo 1960. Diversaĝaj, diversprofesiaj gelernantoj ekkorespondos pri ĉiuj temoj. Skribu multnombre: nepre respondo. Corso di Esperanto - Università Popolare, Padova, Italujo.

Juna 23-jara germano, esperantisto, profesio: komercisto, intencas elmigri kun sia edzino en la jaro 1960 (fino) al Aŭstralio kaj li serĉas kontakton kun samideanoj el tiu ĉi lando. Kio skribos? Mia adreso: Heinz Müller, Beurbarungstrasse 25, (17b) Freiburg (Breisgau).

Deziras korespondi kun la tuta mondo per let. pk. pri diversaj temoj. Erhard Wichmann, Halsekestr. 46, Remscheid, Germanujo.

Kolektante, sendante aŭstraliajn uzi-

tajn poŝtmarkojn al mondaj lernejoj mi propagandas esperanton per ili. Mi ŝatus ricevi por mondlernejoj gelnantoj donace, page aŭ kontraŭ aŭstraliaj uzitaj poŝtmarkoj ĉiulingvajn esperantaĵojn (ŝlosilojn, lernolibrojn, gazetojn, vortarojn ktp.). Eino Looits, 281 Murray Strato, Hobart, Tasmanio, Aŭstralio.

Gesamideanoj de l' tutmondo, kiuj interesiĝas pri la rusa lingvo aŭ jam studadas ĝin, leterkontaktigu kun rusa esperantisto: A. K. Savostianov, P.K. 466, Moskva, Centr. U.S.S.R. Li estas preta laŭeble helpi.

Tutmonda Esperantista kolektanta adresaro 3-a eldono aperos post Pasko. Mendu ĝin tuj. Prezo 4 resp. kup. al Raul Melo, 6 pl. J. Ferry, St. Etienne (Loire), Francujo.

Grava hispana gazeto pro konstruaĵoj, bezonas seriozajn gekorespondantojn por akiri fotojn de modernaj konstruaĵoj. Rekompencos aŭ ŝanĝos laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Juan Farré Sierra, Av. José Antonio 432, Barcelona (15).

Cento da gejunuloj kaj infanoj kuraĝis estigi Pontevedran Esperanto-Klubon, malgraŭ moko de plenkreskuloj. Plej grave, influa instruisto ankaŭ primokis. Ni esperas kaj atendas ricevi almenaŭ **po unu poŝtkarton el ĉiu lando**, kun malgranda teksto kuraĝiga kaj praviga. Tiel la klubo povos plu-vivi kaj faros ekspozicion per la poŝtkartoj. Adreso: Michelena, 16-4º Pontevedra, Hispanio. Elkoran dankon kaj saluton.

Brazila junulo deziras korespondi tutmonde, precipe kun aziaj samideanoj. Auri M. Petroski, Rua 24 de Maio, 183, Curitiba, Paraná, Brazilo.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝtformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

Novaj membroj! Konatiĝu kun

BELARTO

antaŭ ol ĝi estos elĉerpita!

Literaturo
Pentrarto

Muziko
Lingvistiko

Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj
3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj

72 p.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Retoriko

kun aparta konsidero al esperanta parolarto de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo: 11.— gld. bindita


44.— steloj

9.— gld. broŝurita

36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

Esperantista Kulturdomo

Somero 1960

La Kastelo Grésillon akceptos samideanojn de la 15-a de Junio ĝis la 20-a de Septembro 1960.

1-a Periodo : 15. Junio—30. Junio.

Kurso de Esperanto por komencantoj -
Turismaj karavanoj.

2-a Periodo : 1. Julio—14. Julio.

Kursoj de Esperanto (Unua-kaj dua-
gradaj). Diversaj turismaj aranĝoj.

3-a Periodo : 14. Julio—24. Julio.

LINGVAJ KAJ LITERATURAJ STUDOJ
(Internaciaj Kulturaj Ferioj) kun profe-
soro **D. Dalmau** kaj kompetentaj kun-
laborantoj de la Kulturdomo.

Prelegoj : Fonetiko, Esperanto kaj roma-
nidaj lingvoj. Famaj francaj verkintoj :
BALZAC, A. FRANCE, BERGSON. Vizito
de iliaj restadejoj en Loire-regiono.
Diversaj ekskursoj : Loire-Kasteloj, son-
luma spektaklo.

4-a Periodo : 25. Julio—6. Aŭgusto.

Kurso de perfektigo al la franca lingvo
pere de Esperanto. (Por eksterlandanoj).

5-a Periodo : 7. Aŭgusto—28. Aŭgusto.

Esperantistaj kaj kulturaj semajnoj; tri
kursoj de Esperanto.

6-a Periodo : 28. Aŭgusto—11. Septembro.

Praktika kaj supera kurso de Esperanto
sub la aŭspicioj de U.E.F. — Direktoro :
S-ro **RIBOT.**

7-a Periodo : 11. Septembro—20. Septembro.

Ripozo kaj fakaj kunvenoj.

Petu informojn de : Kastelo "Grésillon" — **Baugé** —
M & L — Francujo.

Oni povas ricevi informojn pri la vojo
kaj horaro konsilindaj ĉe la fervojo.
Ĉar jam alvenis multaj demandoj, frua
aliĝo estas konsilinda.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj en la Internacia
Altlernejo de Helsingör, Danlando, okazos
17. — 24.7.1960.

Kursoj : Daŭriga, Perfektiga kaj Prepara kurso por
Cseh-metodaj instruantoj.

Prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, **Aabyhøj**, Danlando.

La plej fama verko de



IBSEN: PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld

Eldonis : **ELDONA RONDO**, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 — Rotterdam-C. — Nederlando

100

eksterordinaraj ekzempleroj

de la

MEMORLIBRO

numeritaj kaj subskribitaj de la Prezidanto
kaj Sekretario de I.O.K. kaj U.E.A.

estos riceveblaj

je la prezo de po 25.— gld.,

100.— steloj

**POR ESTI UNU EL LA FELIĈAJ
POSEDONTOJ DE TIU RARAĴO
MENDU ĜIN TUJ ĈE U.E.A. !**

N.B. Pro la decido de UNESKO kaj ĝiaj aten-
dataj sekvoj la Memorlibro aperos pli
malfrue ol estis planite. Pliaj informoj
sekvos. La antaŭmendintoj ne estu mal-
paciencaj !



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam